

(EN ESPERANTO)

Esperanto

ISSN 0032-4361

1

1993

V-19034/1993
-中國新道

EL POPOLA ĈINIO





Antikva ponto de la
bordo de la Flava Rivero

Foto de WU XINHUA





Umefloroj

Foto de YAN JIN

INTER NI

Sugestoj kaj opinioj

Ĉu eblas publikigi iajn artikolojn pri budha saĝo? EPCĉ jam publikigis multajn artikolojn pri budho, sed nur eksteraj aferoj, ornamaĵoj kaj historioj, ili ĉiuj estas tre interesaj, sed mi bezonas la doktrinon. Mi kredas, ke budha doktrino lernigas al la homaro iom da pacienco, fido kaj tolero, ĉar por la nuna homaro necesas trovi la homan amon.

**ALICE AMALIA
KLEIN** (Brazilo)

Persone mi sentas mankon de artikoloj pri novaĵoj el Tibeto — loko tre interesa kaj por multaj homoj ne tre bone konata. “Ĉu ekzistas Esperanto-movado en tiu loko, aŭ almenaŭ unuopaj esperan-

tistoj en iuj ĝiaj urboj? Sendube multaj el viaj legantoj ŝatus aŭdi pri tio.”

OLAV THORMODSEN
(Norvegio)

Mi volus, ke vi pli multe raportu pri studentoj. Ili estas la plej gaja parto de la socio, samtempe ili estas la estonteco de la nacio. Mi interesiĝas pri historiaj rilatoj de Ĉinio kun najbaraj landoj (Rusio, Hindio ktp.).

VLADIMIR MIĤEJEV
(Ukrainio)

Oni ŝatus trovi pli da humuraĵoj, ludoj, amuzoj, anekdotoj, karikaturoj... Nur unu teksto por komencantoj estas nesufiĉa. La rubriko “Korespondi Deziras” foje estas neekzistanta, kaj ofte tro malgrandigita.

JACQUES RAVARY
(Francio)

La artikoloj estu pli mallongaj, tial leganto povas rapide fiksi en

memoro la enhavon kaj lerni novajn vortojn. Mi pensas, ke Espnovaĵoj estas tro vortavaraj. Mi tre ŝatas belajn kolorajn fotojn, kiuj aldonas belecon kaj fascinas, por ke oni abonu EPCĉ. Kiam neesperantistoj rigardis la revuon kaj petas min legi kaj traduki, ili komencas interesiĝi pri Esperanto.

**HALINA YURSKA-
BEREZOWSKA** (Pollando)

Mi aparte volus laŭdi vin pro la artikoloj en la rubriko “Sur Nia Librobreto”. En Litovio akiri librojn, eldonitajn en Ĉinio, ankoraŭ neblas, tial restas unusola ebleco “konatiĝi” kun viaj eldonaĵoj — tralegi komentariojn, laŭd-vortojn sur paĝoj de via eldonaĵo.

ANTANAS GVILDYS
(Litovio)

Laŭ la sugestoj kaj opinioj de la legantoj ni preparos rilatajn raportojn.

La Red.


ENHAVO

- 6 Novjaraj salutoj
- 12 **Pri la 14-a Tutlanda Kongreso de KPĈ**
- 14 Ekologia loĝejo en Yongkang
- 36 Bona natura haveno Lüsi
- 6 **REFORMADO**
- La administra mekanismo de ĉinaj entreprenoj en ŝanĝiĝo**
- 34 **HISTORIA MISTERO**
- Naŭ bronzaĵoj — simbolo de regpotenco
- 8 En vilaĝo kun moroj kaj kulturoj de la ĉinaj nacioj
- 38 Eŭropa opero en Ĉinio
- 27 **METIARTAĴOJ**
- Novjara bildo reproduktita per karbo en Gaomi
- 26 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 21 **Rekonstrui la hejmlokon**
- 44 En la hejmloko de ruĝvertaj gruoj
- 31 **SUR STRATOJ**

- Malnova strato en malnova urbeto
- 42 **Katolikismo en Ĉinio**
- 40 Ĝojo de tibeta maljunulo
- 51 **LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (XIV)**
- Sur la Riverfonta Vojo
- 30 **ITINERO PROPONITA**
- Septaga itinero A — Pekino-Xi'an-Ŝanhajo
- 50 **AMUZOJ**
- 48 **KURANTAĴAFEROJ**
- 16 Amikeco eterna tra generacioj
- 18 Li estis puŝita en Esperantujojn
- 20 **SUR NIA LIBROBRETO**
- Unu libro pri Japanio kaj la alia pri optimismo
- 17 **POR KOMENCANTOJ**
- Lerni la ĉinan lingvon
- 19 **ESP-NOVAĴOJ**
- 4 **INTER NI**
- 15 **20 KORESPONDI DEZIRAS SUR LA KOVRILO**
- Junaj jaŭ-oj en festaj vestoj
- Foto de HAN HONG**
- 2 Antikva norio ĉe la bordo de la Flava Rivero
- 4 Umefloroj

LOKOJ MENCIAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Anhui-provinco (p. 21)
- 2. Jiangsu-provinco (p. 21)
- 3. Baicheng-regiono (p. 44)
- 4. Yongkang-gubernio (p. 14)
- 5. Qidong (p. 36)
- 6. Shenzhen (p. 8)
- 7. Gaomi-gubernio (p. 27)
- 8. Huangshan (p. 31)



Novjaraj salutoj

EN tiu ĉi numero vi vidas foton de ruĝa umeo, heroldo de printempo. Ĝi estas donaco al niaj legantoj ĉe la nova jaro, ĉar umeo estas simbolo de amikeco.

Donaci al amiko umeflorajn branĉetojn estas tradicia maniero de ĉinoj por esprimi amikecon. Ni volus donaci al niaj legantoj umeflorajn branĉetojn, sed la distanco estas tro longa. Ni do prezentu al vi la foton de umeo por esprimi niajn salutojn. Ĉe la alveno de la kvara jaro de la 90-aj jaroj, en la nomo de la ĉefredaktoro kaj reprezentanto de la tuta personaro de EPC, mi diras al vi dankon pro via helpo en la pasinta jaro kaj deziras al vi sanon kaj multajn sukcesojn en la nova jaro.

Nia gazeto estos renovigita en la nova jaro. En ĉiu numero estos ĉefaj raportaĵoj pri la reformado kaj pordomalfermo, tradicia kulturo kaj popola vivo. Komprenoble, estos artikoloj kun diversaj temoj. EPC estas fenestro de Ĉinio, kaj ni esperas, ke niaj legantoj akiros pere de ĝi novajn sciojn kaj informojn pri Ĉinio.

Ni lanĉis la novajn rubrikojn "Reformado", "Moroj de ĉinaj nacioj", "Metiartaĵoj" kaj "Itinero proponita". Post kelkaj numeroj finiĝos la raportado de la rubriko "Laŭ antikva vojo al Tibeto", kaj ni anstataŭigos ĝin per la nova rubriko "Verdigo en Ĉinio" temanta pri mediprotektado. En tiu rubriko la artikoloj konigos, kiel la ĉina registaro klopodas por reformi sablejon kaj grundon, jungi riverojn, fari forstumadon kaj verdigi urbojn.

"Reformado" raportas pri la atingoj kaj problemoj en la nuna reformado de Ĉinio. Pere de tiu rubriko ni konigos al niaj legantoj la ĝeneralan situacion kaj ĉefan tendencon de la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio. Lige kun tiu rubriko, la gazeto raportos pri la ekonomia disvolvo en la baseno de Yangzi(Jangzi)-rivero kaj ĉemaraj regionoj kaj la limregiona komercado de Ĉinio kun periferiaj landoj.

"Moroj de ĉinaj nacioj" raportas la morajn folklorojn de han-nacio kaj la nacimalplimultoj de Ĉinio, kaj la originon kaj evoluadon de la moroj.

La rubriko "Metiartaĵoj" montras interesajn popolajn metiartaĵojn kiel ekzemple, plektaĵojn, skulptaĵojn, plastikaĵojn kaj brodaĵojn. Montrante la metiartaĵojn, ni konigos ankaŭ pri la vivo de la metiartistoj.

Per "Itinero proponita" ni proponos al vi turismajn itinerojn kun multaj bildoj. La rubriko montras al vi la vidindejojn, trafikon, loĝadon k.a. Ni helpas akcepti turismajn grupojn aranĝitajn precipe de niaj samideanoj.

Sendube, nia gazeto ne estas perfekta. Ni tro multe parolis pri la sukcesoj, sed supraĵe pri malbonaj flankoj, kaj pro tio nia leganto kritikis, ke la gazeto estas "tro roza". Ni certe klopodos por solvi tiun ĉi problemon kaj faros niajn raportaĵojn pli objektivaj. Ĉiaj kritiko kaj konsilo pri la temoj, rubrikoj, tekstoj, fotoj kaj paĝorango estas bonvenaj. Ni multe dankos pro via kunlaboro.

Ĉefredaktoro Wu Xunnan

REFORMADO

La administra en ŝanĝiĝo

LA reformado de la ĉina ekonomia sistemo, kiu ne progresis dum la pasintaj jaroj, komencis rimarkinde disvolviĝi, post kiam la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio publikigis antaŭ nelonge "Reguloj pri Ŝanĝiĝo de la Administra Mekanismo de Industriaj Entreprenejoj de Tutpopola Posedanteco".

KAPTI "LA NAZON DE BOVO"

Ekonomikistoj opinias, ke la ŝlosilo de la reformado de la ekonomia sistemo kuŝas en la reformado de entreprenoj, kaj ŝanĝo de la administra mekanismo estas la plej ŝlosila. Kapti tion ŝajnas kapti la nazon de bovo.

Dum la pasintaj dekoj da jaroj la 11 000 grandaj kaj mezgrandaj ŝtataj entreprenoj de Ĉinio servis kiel apogilo de la nacia ekonomio kaj kreis ĉ. duonon de la totala industria produktovaloro de Ĉinio. Sendube, bona funkciigo de la entreprenoj havas gravan rolon por pligrandigi sintezan nacian forton kaj plibonigi la popolan vivon.

Kion do signifas ŝanĝi la administran mekanismon de entreprenoj? Laŭ opinio de s-ro Chen Jinhua(Ĉen Ĝinhŭa), prezidanto de la Ŝtata Komisiono por Reformi Ekonomian Sistemon, tio signifas reguligi kaj perfektigi la administradon de entreprenoj laŭ la bezono disvolvi la socialisman merkatan ekonomion, por ke la

mekanismo de ĉinaj entreprenoj

de DA WEI

entrepreno liberigu sin de la interveno de la registaro en administradon kaj eniru la merkaton surbaze de la principo mem administri, mem respondeci pri la profito kaj mem disvolvi kaj bridi sin.

DONI RAJTOJN AL LA ENTREPRENOJ

Laŭ la reguloj, la ŝtato donos al la entreprenoj 14 rajtojn, inkluzive de decido pri administrado, difino de produktaja prezo, aranĝo de laborfortoj kaj distribuo de salajroj kaj premio. Tio estas la plej granda dono de rajtoj al la entreprenoj ĝis nun.

En la pasintaj jaroj okazis, ke la ĉina registaro foje refoje akcentis la pligrandigon kaj praktikadon de la administra memstareco de la entreprenoj, tamen la efiko ne estis evidenta. Rezulte de tio stagnis la reformado de la entreprenoj. Sekve, se nur la ŝtataj entreprenoj havos sufiĉe da rajtoj adaptigantaj al la bezono de la disvolvigo de la komerca ekonomio, ili povos fariĝi memstaraj produktantoj kaj administrantoj de komercaĵo.

STARIGI KONKURENCAN MERKATON

Nur malgranda reformado ne sufiĉas por bone funkciigi la ŝtatajn entreprenojn sub la nova situacio, sed necesas rapidigi la ŝanĝigon de la administra mekanismo de tuta entrepreno. Tio fakte signifas, ke Ĉinio turnos sin de la tradicia planizita ekonomio al la merkata ekonomio de

socialismo, kio havos nekalkuleblan influon.

Merkato estas la plej grava ekstera medio de entrepreno. Sen moderna merkato ne estas moderna entrepreno. Ĝenerale, la merkata sistemo de Ĉinio estas subevoluinta.

La reformado kreis favorajn kondiĉojn por starigi novan merkaton. Senĉese kreskas la nombro de vilaĝaj kaj ĉinaj-alilandaj entreprenoj, kiuj prenas merkaton kiel la ĉefan celon, ke la ŝtataj entreprenoj pli-malpli alfrontas la merkaton. La merkata sistemo de socialismo ekhavis rudimentan formon dank' al la starigo de la merkatoj komercaĵa, produktrimedia, kapitala, teknologia kaj labora kaj dank' al la apero de la merkatoj bila kaj dom- kaj terproprita. Iuj fakuloj montris, ke influate de la intenco de pordomalfermo kaj la diferencoj de la regiona disvolvigo, la ĉina merkato ne havas efikan difinon kaj okulfrapas maljusta konkurenco. Kondiĉe ke la entrepreno eniros merkaton, ĝi havos veran profiton, trovos klientojn kaj evitos blindan produktadon kaj superstokadon, alie ĝi ne havos eliron. Tial, oni devas plenenergie puŝi la entreprenon al merkato kaj tuj starigi konkurencan merkaton, en kiu ne mankos justeco.

ŜANĜI REGISTRARAJN FUNKCIOJN

Antaŭ nelonge la Chengdu-a magistrato de Sichuan-provinco altiris la atenton de diverslokaj

registaroj per sia kuraĝa faro. Du plej gravaj ekonomiaj fakuloj de la urbo pliigis la rajtojn kontroli kaj aprobi projektojn de la distriktoj, gubernioj kaj entreprenoj, nuligis la planon de vendado de loĝdomoj ellaboritan por la distriktoj, gubernioj kaj disvolvaj kompanioj de domkonstruado, reduktis specojn de industriaj produktaĵoj produktitaj laŭ plano, ne bridis la produktadon de aliaj specoj, escepte de tiuj severe limigitaj de la ŝtata plano, kaj reguligis la produktadon laŭ la merkata leĝo de valoro. En tiu flanko la magistrato faris gravan paŝon, t.e. la registaro liberigis entreprenon kaj ĉi tiu elturnis sin el ĝi.

Ŝanĝi la funkcion kaj manieron de la registaro por mastrumi ekonomion estas grava ekstera kondiĉo por ŝanĝi la administran mekanismon de entrepreno. Kiel vigligi la entreprenon, se la registaro monopoligas la rajtojn aranĝi laborfortojn, uzi monrimedojn kaj fari liveradon, produktadon kaj internan-eksteran komercon? Tial koncernaj fakuloj montris, ke por fari la entreprenon memstara produktanto kaj mastrumanto de komercaĵoj, la administra fako de la registaro devas nerekte anstataŭ rekte administri ĝin, pli multe uzi ekonomiajn kaj leĝajn rimedojn por reguligi kaj gvidi ĝian ekonomion, bone fari planadon, kunlaboron, servon kaj kontrolon kaj ne interveni en ĝiajn produktadon kaj administradon. ■

En vilaĝo kun moroj kaj kulturoj de la ĉinaj nacioj

Teksto de ZHANG QINGZHEN
Fotoj de LI CHUNGENG

EN Ĉinio ofte videblas, ke loĝantoj de pluraj nacioj vivas en unu vilaĝo, sed neniam kunekzistis moroj kaj kutimoj de dekoj da nacioj en unu vilaĝo, precipe tio neniam okazis en ĉemaraj regionoj. Tamen nun aperis tia vilaĝo en Shenzhen (Ŝenĝen) ĉe maro. Ĝi nomiĝas Primora Vilaĝo.

La vilaĝo estas la unua granda kultura turisma loko de Ĉinio, kie koncentriĝas popolaj moroj kaj artoj de la 56 nacioj de Ĉinio kaj ties tipaj loĝdomoj. En la vilaĝo estas 24 vilaĝetoj, kortoj kaj stratoj de

21 nacioj, kaj krome, ankaŭ multaj aliaj ekipaĵoj kaj 86 unuopaj konstruoj, sume 80 vidindaĵoj kun areo de 180 000 kvadrataj metroj. Kvankam ĝi ne estas natura vilaĝo, tamen ĝi estas konstruita laŭ la principo "el la vivo, sed super la vivo", kaj en skalo de 1/1. La mebloj en la domoj estas faritaj aŭ aĉetitaj ĉe loĝantoj, kiuj vivis en la primitivaj vidindejoj, kaj la loĝantoj invitite venis el malsamaj nacioj de malsamaj lokoj. Tial la koncentritaj vidindaĵoj kaj pure naciaj kulturoj de la vilaĝo altiras sennombrajn ĉinajn kaj alilandajn turistojn.


Ascendante la ŝtuparon ĉe la


orienta enirejo de la vilaĝo, mi vidis unue horizontalan trabon 7 m longan kaj 1.5 m larĝan. Sur ĝi estas gravuritaj vortoj "Vilaĝo kun Moroj kaj Kulturoj de la Ĉinaj Nacioj". Ĝi estas nigrigita per fumo, kio sentigas longtempan ekzistadon. Oni diris, ke ĝi estas transportita el primitiva arbaro de la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo.

La unua vidindaĵo de la vilaĝo estas Huizhou-strato. Ĝi estas unu el la tri vidindaĵoj de la vilaĝo konigantaj la kulturon de Han-nacio, kiu havas la plej grandan loĝantaron el la 56 nacioj de Ĉinio. La aliaj du vidindaĵoj prezentas popolajn loĝdomojn de norda Shaanxi (Ŝenŝji) kaj kvadratajn kortojn de Pekino. En Huizhou de Anhui-provinco konserviĝas plej kompletaj konstruoj de Ming-dinastio (1368-1644), kiujn prezentas nun la strato. Ĉie en la antikva ŝtonplata strato Huizhou, ĉ. dekojn da metroj longa kaj 6-7 m larĝa, videblas flirtantaj flagoj de restoracioj kaj bele pentritaj pordoj kaj fenestroj, kiuj sentigas, ke oni vivas kvazaŭ antaŭ centoj da jaroj.

Elirinte el la strato, mi venis en korton de ji-oj. Antaŭ la domo estis budo plena de melo-

Va-a virino teksas koloran rubandon.





Totemo antaŭ vilaĝo

noj kaj en alia domo metiĝis ore bakita tabako. La tegmento kun kava mezo similas al funelo. Kiam pluvas, la akvo ellaseblas tra la tegmento. En la ĉambro lokiĝas fajrujo. Vintre ĉiuj familianoj sidas ĉirkaŭ ĝi, maljunuloj rakontas historieton kaj junuloj kantas popolkanton. Sur la muro ĉe la fajrujo pendas ĉaspafilo kun duobla tubo, ĉasitaj fazanoj kaj sekigitaj ruĝaj kapsikoj. La kuseno el seka pajlo servas kiel seĝo. Ĉiuj objektoj en la ĉambro estas en stilo de ji-oj.

En la vilaĝeto de daj-oj mi nudpiede ascendis bambuan domon de daj-oj. Min varme bonvenigis gejunuloj en daj-aj vestoj. Mi demandis ilin: "Ĉu vi estas daj-oj?" La junuloj respondis en la ĉina komuna parola lingvo: "Jes." En ĉiuj vidindejoj de la vilaĝo knaboj kaj knabinoj prezentis al turistoj kutimojn kaj morojn de sia nacio.

Daj-oj havas la kutimon sidi kaj dormi surtere. Estis tre agr-

able por mi nudpiede stari en la bambua domo bone aerumita. Ĝenerale, ĉiu bambua domo konsistas el vastaj gasteĉambroj kaj dormoĉambroj. En la gasteĉambro estas televidilo, elektra ventumilo kaj aliaj elektraj aparatoj. La dormoĉambro estas destinita por la tuta familio. Sur la planko sterniĝas tapiŝo kaj littuko bonorde. Iu turisto demandis: "Ĉu estas same en ĉiuj aliaj daj-aj familioj?" Iu svelta knabino respondis: "Same en plejparto de la familioj. De la lastaj jaroj iuj familioj vivas pli lukse." Iuj el la turistoj ŝpinis fadenojn en koridoro kaj aliaj sur la balkono portis daj-ajn talitamburon kaj pajloĉapelon por foti sin.

Transpasinte ŝanceliĝantan lianan ponton de derungoj, mi venis en la vilaĝeton de dong-oj. Oni povas diri, ke dong-oj estas geniaj arkitektoj. Ili konstruis ponton kontraŭ vento kaj pluvo kaj tamburan turon kun kompleksa strukturo kaj senkompara beleco, uzante nenian

najlon. Por kunigi ĉiujn partojn de la konstruoj, ili uzis nur tenonojn. Tie funkciis muellilo kaj norio, kies knarado aŭdeblis de fore.

Mi iris de unu vilaĝeto al alia kaj vidis, ke tie ondas montoj, bruas akvofaloj, serpentas riveroj kaj moviĝas boatoj. Ĉiuj homoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, ebriiĝis de la poezia pejzaĝo. Antaŭ ol sufiĉe mediti pri ĉio ĉi, mi informiĝis, ke la aktivado kulminos tuj en la venonta nokto.

Apenaŭ batis la 19-a, miloj da turistoj jam atendis en du longaj vicoj flanke de la pordo de la vilaĝo. En surdiga tamburado kaj gongado venis paradantoj el naciaj artistoj. Altaj manĉuraj knabinoj dancis dancon de sia hejmloko nordorienta Ĉinio; tuĝja-aj knaboj kun pajlo sur la korpo, foje refoje skuante la kapon kaj svingante la ŝultrojn, dancis la antikvan dancon Mogus montrantan la naivecon de la homoj en la infanaĝo; kaj kulminis kolektiva amuziĝo. En la aktivado tre interesis iro sur stilzoj, danco en surteraj boatoj kaj ludo kun artaj leonoj.

Post la parado regis momenta silento. Sed tuj poste leviĝis hurado. La koloraj fontanoj akompanataj de muziko pli entuziasmigis la rigardantojn. Je tio aŭdiĝis agrabla nacia muziko kaj sur la surfaco de proksima lago ŝprucis akvokurteno kun areo de 400 kvadrataj metroj, sur kiun sendiĝis laserradioj de fore. Sur la kurteno aperis la vortoj: "Varman bonvenon al la gastoj!" Kun la ritma muziko sur ĝi intermite aperis laserradioj kaj bildoj de



La Primora Vilaĝo


flugantaj kolomboj, verda herbotapiŝo kaj balanciĝantaj salikvergoj.

Kiam duafoje eksonis muziko, la fontanoj formis sepkolorajn lotusflorojn. Akompanate de la muziko, la fontanoj ŝprucis rekte aŭ oblikve ĝis la altoj de 15, 12, 8 kaj 5 m respektive, en diversaj koloroj. Subite el akvokurteno kun areo de 1 200 kvadrataj metroj ĵetiĝis al la ĉielo 40-metra akvokolono, kio vekis aplaŭdon ĉe la spektantoj.

La aktivado daŭris du horojn. La rigardantoj pasigis la vesperon en soleno, ĝojo kaj feliĉo kaj multe ĝuis la enhavoriĉajn kulturojn de la 56 nacioj. ■

Gaŭŝan-a virino en brodado





Dancado antaŭ vilaĝo de mjaŭ-oj

Vizitantoj en la Primora Vilaĝo



Pri la 14-a Tutlanda Kongreso de KPĈ

LA frua aŭtuno de 1992 estis eksterordinara por Pekino. En tiu tempo 2 000 reprezentantoj de la Komunista Partio de Ĉinio (KPĈ), la reganta partio de la lando, tie kolektiĝis kaj okazigis ĝian 14-an Tutlandan Kongreson, kun la konfido de 51 milionoj da kompartianoj kaj 1.1 miliardoj da popoloj. La kongreso resumis la praktikan sperton en la pasintaj 14 jaroj de la Tria Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de KPĈ en 1978, difinis strategian dispozicion por la venonta periodo kaj mobilizis la tutan partion kaj diversnaciajn popolojn al plua-paŝa liberigo de la penso kaj kaptado de la favora ŝanco por rapidigi la paŝojn de la reformado, pordomalfermo kaj moderniga konstruado, por atingi pli grandajn sukcesojn en la konstruado de la socialismo kun ĉinaj karakteroj.


La kongreso inaŭguriĝis en la 12-a de oktobro kaj daŭris unu semajnon. Jiang Zemin (Ĝjang Zemin), ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (CKKPĈ), en la nomo de la Dektria Centra Komitato de KPĈ faris raporton sub la titolo "Akcelu la reformadon, pordomalfermon kaj modernigon, por atingi grandajn sukcesojn en konstruado de la socialismo kun ĉinaj karakteroj". En sia raporto li retrospektive rigardis la vojon iritan de la ĉina popolo en la pasintaj 14 jaroj, sub la gvido de KPĈ. La

Tria Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de KPĈ okazigita en 1978 faris la historian turniĝon de la labora gravito de la partio kaj la ŝtato al ekonomia konstruado kaj kreis novan periodon por disvolvi la socialisman aferon de Ĉinio. La sesio decidis praktiki la reformadon kaj pordomalfermon kaj emfazis, ke estas necese daŭrigi la socialisman vojon, firme teni la popoldemokratian diktaturon, persisti en la gvido de KPĈ kaj persisti en marksismo-leninismo kaj Maozedong-penso. El ĉio ĉi formiĝis la baza linio de la partio por la nova periodo. Sub la orientado de tiu linio en la 14 jaroj la ĉina popolo plenergie rapidigis la reformadon kaj en la tuta lando regis vicleco. En 1984-1988 la ĉina ekonomio pli rapide disvolviĝis, la nacia ekonomio leviĝis al nova nivelo kaj solviĝis la problemoj pri manĝado kaj vestado.

La raporto montras, ke la okulfrapa trajto en la nova periodo estas reformado kaj pordomalfermo, kaj Deng Xiaoping (Deng Ŝjaŭping) estas la ĝenerala projektanto de la reforma kaj pordomalferma politiko kaj la moderniga konstruado de Ĉinio. Li respektas praktikon kaj donas grandan atenton al la intereso kaj aspiroj de la plej vasta popolamaso. Li faris historian kontribuon por la teorio pri konstruado de la socialismo kun ĉinaj karakteroj.

La raporto opinias, ke en la pasintaj 14 jaroj estis misfaroj aŭ eraroj en la laboro. Nun ankoraŭ multaj malfacilaĵoj kaj problemoj ne estas solvitaj. La popolo ankoraŭ havas multajn plendojn pri iuj laboroj. Sed la ĝenerala opinio estas, ke la 14 jaroj estis jaroj, en kiuj ĉiuj fortoj vere koncentriĝis por konstrui socialismon, kaj plej rapide plialtiĝis la nivelo de popola vivo. La praktiko en la 14 jaroj kaŭzis ampleksan kaj profundan ŝanĝiĝon en la socio kaj tiusence ĝi estigis novan revolucion.

La kongreso alte taksis la gravajn parolojn de Deng Xiaoping faritajn en lia inspektado al suda Ĉinio en la komenco de 1992. Li analizis la aktualajn situaciojn enlandan kaj mondan, science resumis la bazajn praktikojn kaj sperton de la partio de post 1978, kaj klare respondis multajn gravajn demandojn de konado, kiuj katenis la penson de la homoj en la jaroj. Ekz., kiel trakti planizitan ekonomion kaj merkatan ekonomion? Li emfazis, ke la partio devas persisti en la baza linio senŝanceliĝe por cent jaroj. Li postulis pli multe liberigi sian penson, pli kuraĝe fari reformadon kaj pordomalfermon, plirapidigi konstruadon kaj neniel perdi la bonŝancon. Laŭ tiu ĉi postulo CKKPĈ kaj la Ŝtata Konsilantaro ellaboris serion da rezolucioj pri rapidigo de la reformado kaj pordomalfermo kaj ekonomia disvolviĝo. Tio markis, ke la reformado kaj pordomalfer-



La inaŭguro de la 14-a Tutlanda Kongreso de KPC

mo kaj moderniga konstruado de Ĉinio jam eniris en novan etapon.

La kongreso faris grandan paŝon en la problemo pri la reformado de ekonomia sistemo. Ĝi montris, ke la reformado de la ĉina ekonomia sistemo celas starigi la sistemon de socialisma merkata ekonomio. Tio estas meti la merkatajn fortojn sub la makroekonomian reguligon far la ŝtato kaj servigi ilin kiel bazajn rimedojn en reguligo de monrimedoj, subigi ekonomian aktivadon al la leĝo de valoro kaj konformigi ĝin al la ŝanĝiĝo de la rilatoj inter provizo kaj bezono; utiligi la funkcion de preza vektoro kaj konkurenca sistemo, reguligi monrimedojn en bonefikajn ĉenerojn, doni preforton kaj movforton al entreprenoj kaj disvolvi la bonajn kaj elimini la malbonajn; kaj utiligante la lertan reakcion de la merkato al diversaj ekonomiaj informoj, akceli la akuratan reguligon de produktado kaj bezono. La kongreso montris ankaŭ, ke starigi kaj perfektigi la sistemon de socialisma merkata ekonomio estas procedo longa, peniga kaj komplika, oni devas kaj fari kontinuan penadon kaj rapidigi sian laboron.

Laŭ la strategia dispozicio por efektivigi la socialisman modernigon en Ĉinio, la 90-aj jaroj estas ŝlosilaj, en kiuj estas defioj, sed

ĉefe bonŝancoj. En la venontaj 5 jaroj, se oni kaptos favorajn ŝancojn, akcelos la reformadon kaj pordomalfermon, por ke la nacia ekonomio surpaŝu novan ŝtupon, Ĉinio do povos sufiĉe riĉiĝi kaj meti firman bazon por atingi pli altan celon en la venonta jarcento. Por tiu celo la kongreso postulis, ke nepre necesas finplenumi la dek ĉefajn taskojn koncerne al la tuto. Ili estas jene: akceli ekonomian reformadon kun la starigo de socialisma merkata ekonomio, pli larĝe malfermi la pordon al la mondo kaj pli multe kaj pli bone uzi alilandajn kapitalojn, monrimedojn, teknikojn kaj administratajn spertojn, reguligi kaj bone funkciigi industrian strukturon, dediĉi grandan atenton al agrikulturo kaj akceli la disvolviĝon de la bazaj industrioj, bazaj instalaĵoj kaj terciara industrio, akceli la progreson de sciencoj kaj teknikoj, plenergie disvolvi edukadon kaj plene disvolvi la talentojn de intelektuloj, senĉese altigi la vivnivelon de la popolo, strikte bridi loĝantaran kreskon, plifortigi median protekton k.a.

Laŭ la antaŭe difinita rapideco de la disvolviĝo de la nacia ekonomio de Ĉinio, la totala produktovaloru de la nacia ekonomio en la 90-aj jaroj kreskos je 6 procentoj ĉiujare. La kongreso opiniis, ke laŭ la enlanda kaj monda situ-

acioj, estas eble plirapidigi la kreskon. Laŭ rudimenta takso, ni povos akceli la kreskon ĝis 8-9 procentoj. La kongreso postulis, ke oni strebu antaŭen por atingi la rapidecon, surbaze de plialtigo de kvalito, bona funkciigo de strukturo kaj pligrandigo de profito. En la fino de la kuranta jarcento la totala produktovaloru de la nacia ekonomio superos la celon, ke ĝi kvarobliĝos kompare kun tiu en 1980. La ĉefaj produktaĵoj de agrikulturo rimarkinde plimultiĝos, industria strukturo kaj loka ekonomia aranĝo estos relative raciaj, sciencoj kaj teknikoj rapide disvolviĝos, administrado pliboniĝos kaj la popolo vivos bonhavan vivon.

Ĉe la fermo de la kongreso estis elektitaj la novaj CK kaj Centra Disciplin-kontrola Komitato de KPC, aprobitaj la rezolucioj pri la raporto kaj aliaj de la Dektria Centra Komitato de KPC kaj estis decidite, ke ne plu funkcios la Centra Konsiliĝa Komitato de KPC, kiu faris grandan kontribuon por la aferoj de la partio.

La kongreso estis fermita en la 18-a de oktobro, bone plenuminte la gravan taskon donitan de la historio. En la sekvanta tago la Dekkvara Centra Komitato de KPC okazigis sian Unuan Plenan Sesion kaj elektis la centran gvidan organon: Jiang Zemin estis elektita kiel la ĝenerala sekretario de CKKPC kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CKKPC; Wei Jianxing (Ŭej Ĝjansing) — kiel sekretario de la Centra Disciplin-kontrola Komitato de KPC; Jiang Zemin, Li Peng, Qiao Shi (Ĉjaŭ Ŝi), Li Ruihuan (Li Ĵujhuan), Zhu Rongji (Ĝu Ĵongĝji), Liu Huaqing (Liŭ Hŭaĉing) kaj Hu Jintao (Hu Ĝintaŭ) — kiel membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CKKPC.

La membroj de la nova CKKPC plejparte estas ĉefaj gvidantoj de diversaj lokoj kaj departementoj, iuj el ili estas specialistoj kaj erudiciuloj. Ilia meznom-

Ekologia loĝejo en Yongkang



Ekologia loĝejo de Lü Xinyan

NUR en provado estas ekologia loĝejo en la ĉina kamparo, tamen la kamparanoj, kiuj plej frue komencis vivi en tia loĝejo, jam spertis ĝian superecon. Lü Xinyan (Lju Ŝinjan) estas unu el ili.

Li loĝas en Jinban(Ĝinban)-vilaĝo de Yongkang-gubernio de Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco.

Kiam ni venis al lia hejmo, li revenis de kamplaboro kune kun sia edzino.

Lia domo estas trietaĝa kaj havas la areon de 112 kvadrataj metroj. Ekstere, tiu etaĝdomo en cementa strukturo similas al ordinaj etaĝdomoj, tamen, interne de ĝi estas multaj distingajoj. Post piedpremo sur la planko ĉe la flanko de la etaĝdomo, tuj eksonas la sub-

tera parto, kio multe mirigas la vizitantojn. Tie estas la ŝlosilaj instalaĵoj de tiu ĉi ekologia etaĝdomo: metana baseno, metanpuriga baseno, metanfiltra baseno kaj akvopuriga puto. En la unua etaĝo estas porkejo, ĉambro por malgranda pumpilo, tenejo de produktaj iloj kaj ĉambro, kie la mastroj okupiĝas pri industria kaj akcesora produktado. En la dua etaĝo estas

bra aĝo estas 56.3 jaroj. I.a. virinoj konsistigas 7.5% kaj nacimulplimultanoj 10.3%. Ili plejparte ricevis altgradan edukadon kaj fakan trejnadon. Tio sendube donis organizan garantian por adaptiĝi al la nova situacio kaj gajni pli

grandajn sukcesojn en la konstruado de la socialismo kun ĉinaj karakteroj.

La 14-a Tutlanda Kongreso de KPC estis kongreso kun profunda signifo. Ĝi enkorpiĝis demokration, unuigon kaj praktikemon,

kaj plenis de atmosfero de reformado kaj pordomalfermo. Ĝi nepre estos enskribita en la historion kiel nova kaj brila paĝo por pluaparte akceli la reformadon kaj pordomalfermon kaj la modernigan konstruadon de Ĉinio. ■

dormoĉambro, gastoĉambro, kuirejo kaj tualetejo. Kaj la tria etaĝo servas kiel ilia legoĉambro aŭ amuzejo.

Sur la ebena tegmento de la etaĝdomo, krom sunenergia akvovarmigilo, estas ankaŭ konservejo de likva metano, akvopurigejo kaj fiŝbredejo. La legomplantejo konsistigas 80% de la totala areo de la tegmento, kun tertavolo dika 10-20 centimetrojn. La mastroj prenas likvan metanon el la metana baseno kiel sterkon, tial la tertavolo estas fekunda, ne poluata nek atakata de fiinsektoj. Lŭ Xinyan konigis al mi, ke sur tiu peco da tero li kultivas bulbojn, ajlojn, laktukojn, ĉinajn brasikojn, kapbrasikojn, terpomojn, kapsikojn kaj ankaŭ peoniojn, rozojn kaj vinberujojn. Ĉiujare li rikoltas ĉ. 1 000 kg da legomoj. Ĉe la anguloj de la tegmento kreskas pli ol 40 mandarinujoj. La gastama mastro petis min gustumi mandarinujojn kaj mi opiniis, ke ili estas pli dolĉaj ol tiuj aĉetitaj de mi en la guberniurbo, eble tio estiĝis pro sufiĉa sunlumado, granda diferenco de temperaturo inter tago kaj nokto kaj la efiko de likva metano.

La malgranda etaĝdomo de Lŭ Xinyan estas projektita de la gubernia instituto de ekologiaj konstruaĵoj. Pri la supereco de ekologia etaĝdomo, la estro de la instituto s-ro Xu Tingxi (Ŝju Tingŝji) diris, ke por protekti la medion kaj faciligi la vivon ili projektis tian etaĝdomon. Preparo de manĝaĵoj, lumigo per metano kaj banado per sunenergia akvovarmigilo povas ŝparigi energion kaj purigi aeron. Kaj la utiligo de la tegmento de la etaĝdomo kreskigas la enspezon kaj faciligas la vivon de la kamparanoj de Yongkang-gubernio, en kiu ĉiu havas nur 0.58 muon da tero (15 muoj = 1 hektaro).

“Kiel preventi tralikiĝon de akvo, kiam oni kultivas legomojn sur la tegmento de etaĝdomo?” mi demandis.

La estro de la instituto respondis: “La tralikiĝo de akvo kaŭziĝas ĉefe pro la fendigo aperinta supre de la etaĝdomo pro vento, sunlumo

kaj frostigo. La tero sur la tegmento de la ekologia etaĝdomo estas malseketa tutjare kaj la cementa tegmento estas protektata, tial al la tegmento de la ekologia etaĝdomo ne okazas tralikiĝo de akvo.”

Kvankam nemultaj estas ekologiaj konstruoj en Yongkang-gubernio, tamen pere de ili oni faras ĉiajn provojn. Tie ni vizitis ankaŭ ekologia etaĝdomon, sur kies tegmento oni bredas fiŝojn en baseno, kaj ekologiajn laborejon de la kemia fabriko.

La rivereto Huaxi (Hŭaŝji) fluas tra Yongkang-gubernio. Antaŭe la rivero verdis kiel smeraldo. En bela printempo blankaj nuboj kaj flavaj kaj ruĝaj floroj ambaŭborde de la rivero ĝuigis la intensan poezian etoson de la loko.

Tamen, antaŭ dek jaroj, iu kemia fabriko konstruiĝis ĉe la rivero. Pro la postiginteco de ĝia teknologio, ĉiujare ĉ. 100 000 tunoj da eluzita akvo enfluis en la riveron kaj serioze poluciiis ĝin, ke eĉ fiŝoj ne povis vivi plu en ĝi.

En la lastaj jaroj sciencistoj pri ekologio helpis tiun fabrikon kon-

strui ekologiajn laborejon, kiu multigis la polucion kaj faris valoraĵon el la eluzitaĵoj. En la teretaĝo de la ekologia laborejo funkcias instalaĵoj por trakti eluzitan akvon kaj en la alia parto oni bredas porkojn. La dua etaĝo estas uzata kiel kokobredejo kaj la tegmento de la tria etaĝo kiel legomĝardeno. La konkreta metodo estas: elpreni la utiligeblajn materialojn el la eluzita akvo kiel nutraĵon por porkoj kaj kortobirdoj, meti la restintajn feĉojn kaj verŝi akvon en la subteran basenon por produkti metanon kaj aliajn gasojn kiel aldonon de la energio por la vivo de la laborantoj de la fabriko. La likva metano kaj metana feĉo estas uzataj por sterki la tertavolon supre de la etaĝdomo. Laboristoj de la fabriko diris, ke ĉiujare ili povas ŝpari almenaŭ 100 000 kg da brutonutraĵo.

En Yongkang-gubernio la ekologiaj etaĝdomoj faris eluzitaĵon nemanĝebla por metana baseno, tiel ke pli-malpli puriĝis la medio de la gubernio. Nun oni konstruas grandan ekologiajn regionon en la vilaĝo Dahuayuan de la gubernio. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondekuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

*Huang Zhong, 20-j. studento, dez. kor. kun diverslandaj esperantistoj pri literaturo, foto, nacia moro, bk. kaj pm. Adr.: Huangzhai Cun, Xipo Guanqu, Dongli Zhen, Haikang, Zhanjiang 524242, Guangdong, Ĉinio.

*Liu Jian, 40-j. komercisto, dez. kor. Esperante, angle, japane, ĉine kaj ruse pri ĉiuj temoj. Adr.: She Jian Cun Ping Fang Nr. 172, Bantang Pu, Xiangtan 411102, Hunan, Ĉinio.

*Han Daqiang, 20-j., dez. kor.

kun geesperantistoj tutmondaj pri pentraĵo, fotografo, lingvo, muziko, literaturo, kredo kaj aliaj temoj. Adr.: 7-105 Minfeng Lou, Dafeng Lu, Hongqiao Qu, Tianjin 300121, Ĉinio.

*Dez. interŝanĝi poŝtmarkojn pri Olimpiadoj. S-ino Graca Alves, Rua Joao Eugênio de Lima, 200-B. Viagem, 51030-360 Recife-Brazilo.

*Jrina V. Zvjozdkina, 25-j. kemiisto, dez. kor. tm. Esperante, angle aŭ ruse, interesiĝas pri naturo kaj floroj. Adr.: St. Bljuĥjer 16-42, Ekaterinburg, 620066 Rusio.

*Douke Taturu, 80-j. fotoamanto, dez. kor. kaj interŝ. fotojn, kiujn vi fotis en viaj urboj. Adr.: Okino 6-31-51 Wakabayasiku, Sendai-si, 982-01 Japanio.

*Mark Vines, 32-j. fraŭlo, estonta vojaĝ-peranto, dez. kor. pri vojaĝado, lingvo, kulturo, historio, aparte kun azianoj. Interŝ. fotojn,

Amikeco eterna tra generacioj

Septembro 1992 estis la 20-a datreveno de normaligo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio. En la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto ĉinaj kaj japanaj esperantistoj okazigis memorkunvenon posttagmeze de la 18-a de aŭgusto. Ili interŝanĝis pensojn kaj esprimis sian komunan sopiron al paco, kio havas grandan signifon. Sube ni aperigas ekstraktojn de la tekstoj de la paroladoj de du japanaj esperantistoj faritaj en tiu memorkunveno.

La Red.



S-ro Nisikawa Toyozo

EN septembro de 1972 japana ĉefministro Tanaka Kakuei vizitis Pekinon kaj sukcesis renormaligi la diplomaciajn rilatojn inter Ĉinio kaj Japanio. De tiam pasis 20 jaroj, kaj ni kunvenas ĉi tie por celebri la datrevenon de la memorinda afero en la historio de niaj du nacioj.

Kiam mi tiamaniere retrovidas la pasintajn jarojn, profunda emocio venas en mian koron. Kian longan vojon ni iris por atingi la kompletan pacon kaj profundan amikiĝon inter niaj du nacioj!

Nuntempe la rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio estas en bona stato. Niaj du popoloj estas eternaj najbaroj. Nia amikeco devas esti eterna.

Por esti veraj amikoj, nur pre-

mi manojn kun rideto estas ne sufiĉe. Ni devas kredi nin reciproke. Ni devas respekti nin reciproke. Mi kredas, ke nia amikeco estos eterna tra generacioj.

Mi estas tre ĝoja, ke ni havas kongreson en Ĉinio en tia signifiplena momento.

Mi deziras pluan prosperon al niaj du landoj!

**Nisikawa Toyozo,
Prezidanto de la Japana
Esperanto-Instituto**

LA urbo Qingdao, kie nun okazas la Pacifika Kongreso de Esperanto, estas por mi kosmopolita urbo, kio vekas ĉe mi diversajn imagaĵojn, el kiuj estas du reprezentantaj elementoj: unu estas hela kaj la alia malhela.

La unua signife egalas al pitoresko kaj milda klimato. La dua estas malhela imagaĵo, kiu montras la fakton, ke troviĝis la malĝoja historio de la urbo, suferigita kiel kolonio dum longa tempo pro eksterlandaj okupoj.

Mi naskiĝis en la somero de 1936. La estimata s-ro Lusin, tutmonde konata genia literaturisto de Ĉinio, kiu havis profundan rilaton kun Japanio, forpasis en tiu jaro. Krome, la 15-an de aŭgusto okazis malvenko de Japanio kaj finiĝis la Dua Mondmilito, kaj tiom pli impresas min la sezono somero.

Japanaj esperantistoj havis ankaŭ tre kompatindajn rememorojn ĝis la malvenko de Japanio. Oomoto ankaŭ estis povra, spertinte penigan tempon. Kaj mia familio samkiel mi estis malfeliĉa. Pro la malvenko de Japanio, la 15-an de aŭgusto, multaj homoj saviĝis kaj liberiĝis eĉ en Japanio. Tio signifas, ke ili estas plene liberigitaj el la manoj de ŝtataj kaj registaraj aŭtoritatoj, kiuj ignoris homajn rajtojn laŭ



S-ro Deguchi Kyotaro

Lerni la ĉinan lingvon

de ZENG XIAOFEN

tiana japana militarisma kaj agresisma sinteno.

Entute 6 fojojn mi vizitis Ĉinion, interalie tri fojojn Qingdao. Dank' al la paco kaj realiĝo de la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio mi povis tiom ofte veni al Ĉinio kaj Qingdao. En tiu ĉi fojo mi forflugis de Osaka la 15-an de aŭgusto por partopreni en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, kaj en samtaga vespero jam atingis la urbon Ŝanhajo.

La 15-a de aŭgusto ja estis la tago de sorto. Ĝi estis rememorprofunda tago ne nur en Japanio, sed ankaŭ en Azio. La ĝojo liberigita de militarismo, pri kiu mi private kaj ankaŭ Oomoto pensis, samtempe igas nin rememori la militon. Kiam mi havis rememoron pri la krimoj, mia koro komplikiĝis de du elementoj. Alveninte la urbon Ŝanhajo en la tago, kies signifo entenas la pezon, mi havis tre komplikan penson, sentante la helan kaj malhelan flankojn de la signifo.

Ĉiuokaze mi deziras, ke Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto kaj mi daŭrigu klopodojn, kvankam modestajn, por fortigi kaj vastigi pace amikecan solidarecon de Azio, surbaze de la nuna amikeco inter Ĉinio kaj Japanio. Fakte, EPA estas malgranda kaj nepotenca organizo, tamen ni volas plenumi tion, kion ni povas fari, interalie per Esperantaj agadoj por profundigi ĝin. Tial mi petas de vi grandan kunlaboron.

Deguchi Kyotaro,
Prezidanto de Esperanto-
Propaganda Asocio de Oomoto

KIAM mi renkontiĝis kun alilandaj samideanoj, ni parolis ne nur pri niaj travivaĵoj, sed ankaŭ pri la ĉinaj historio, moroj, lingvo kaj kulturo. Foje je mencio de la ĉina lingvo iu korea maljunulo diris al mi: "La ĉina lingvo estas bela, tamen malfacila. En Koreio la maljunuloj iom uzas ĝin, sed la junuloj preskaŭ ne."

"Se vi havas intereson, mi instruos al vi senpage," mi ridis.

La maljunulo ĝojiĝis kaj mi tuj komencis plenumi mian promeson. Mi instruis al li unue la ĉinlingvan fonetikan alfabeton kaj la kvar tonojn. Vidinte, kion mi skribis, li larĝe malfermis siajn okulojn: "Kia ĉinlingva fonetika alfabeto! Evidente ĝi prezentas anglajn literojn!"

Mi klarigis: "Eble tio estas unu el la kaŭzoj, kial vi trovis la ĉinan lingvon malfacile lernebla. Por disvastigi la norman komunan parolan lingvon bazitan sur la pekina dialekto, la ĉinoj pruntis facile memoreblajn latinajn literojn kaj, konsiderante la prononcan karakterizaĵon de la ĉina lingvo, elpensis la ĉinlingvan

fonetikan alfabeton propran al la ĉeflando de Ĉinio."

La maljunulo ekinteresiĝis. Post kelkfoja legado de la alfabeto kaj ekzercado de la kvar tonoj, li ĝojoplene diris al mi: "Bonege! Ĉiujn literojn mi konas, kaj la prononco ne estas stranga. Mi povos literumi per mi mem, ĉu ne?" Dirante li skribis la nomojn de Sun Quan (Sun Ĉjŭan) kaj Liu Bei laŭ la klasika ĉina skribsistemo kaj petis, ke mi notu koncernajn latinajn literojn laŭ la ĉina fonetika alfabeto.

Per la ĵus lernita literumado li elparolis "Sun Quan" kaj "Liu Bei", kvankam kun iom malĝusta tono. Li plezuriĝis: "Ne malfacile! Ne malfacile!" Mi diris: "Ekzistas ankaŭ aliaj facilaĵoj." Sub la skribitaj nomoj mi notis simpligitajn ĉinajn ideogramojn.

Surprizite, la maljunulo fiksas la rigardon sur la simpligitaj ĉinaj ideogramoj, ne povante fermi sian buŝon. Li emocie diris longe montrante la dikfingron: "Mirinde! 30 jarojn antaŭe, mi sentis la ĉinan lingvon malfacile lernebla; nun mi maljuniĝis, male mi sentas ĝin facila. En la estonteco mi certe iros al Ĉinio, se mi havos ŝancon." ■

Li estis puŝita en Esperantujon

— Intervjuo al Han Moo-hyup, prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio



S-ro Han Moo-hyup

DANK' al mia profesio, mi ofte kontaktiĝas kun alilandaj esperantistoj, tamen el ili troviĝas malmultaj koreaj esperantistoj. S-ro Han Moo-hyup, prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio, estas unu el ili.

Mi konatiĝis kun s-ro Han Moo-hyup en la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazigita en Qingdao (Ĉingdaŭ), aŭguste de la pasinta jaro. Li donis al mi sian vizitkarton, sur kiu je la unua rigardo mi vidis verdan steĉon. Sur ĝi troviĝas lia titolo ne nur en la lingvo korea, sed ankaŭ ĉina. S-ro Han humure diris: "Moo-hyup signifas kunlabori per forto." La signifo estas tute sama kiel tiu en la ĉina lingvo. Kvankam ni unufoje intervidiĝis, tamen jam intimiĝis pro la proksimeco de situo kaj kulturo de niaj du landoj.

Han Moo-hyup naskiĝis en 1923. Li servis en mararmeo kiel generalo. Post la ekŝigo li funkciis kiel la direktoro de la Kuma Teknika Altlernejo. Poste li laboris en du asekuraj kompanioj ĝis li emeritiĝis en 1985.

Li eklernis Esperanton, instigite de iu korea samideano. S-ro Han diris, ke en 1976 la korea E-movado malviglis. Li estis dungita kiel prezidanto de la Hjondai-a Asekura Kompanio pri Fajro kaj Maro. Tiutempe s-ro Kim Il venis al lia oficejo kaj parolis pri Esperanto. S-ro Han opiniis, ke esperantistoj estas sennaciistoj kaj "spionoj". S-ro Kim klarigis Esperanton al li duonhoro kaj demandis, ĉu li volas lerni Esperanton. Komence s-ro Han dubis, kial li tiel energie propagandas al li Esperanton kaj kial li tiel

forte petas lin subteni E-movadon. Poste, li renkontis s-ron Kim en akademia konferenco kaj ili fariĝis amikoj. Sekve li decidis lerni Esperanton.

S-ro Kim estis vigla kaj sincera. Komence s-ro Han lernis Esperanton ĉe li. Li lernis sume 20 tagojn, unu horon ĉiumatene. Poste, s-ro Kim Il transloĝiĝis en Kanadon, tamen nun ili ankoraŭ tenas bonan rilaton.

Ŝajne, s-ro Han devigate eklernis Esperanton. Tamen poste, li iom post iom interesiĝis pri la lingvo kaj ŝanĝis sian opinion pri Esperanto kaj esperantisto. Li opinias, ke Esperanto estas tre grava komunikilo, kiu multe faciligas komunikadon inter diversaj popoloj, pro tio la esperantistoj povas puŝi antaŭen la kunlaboron kaj progreson de la homaro.

S-ro Han multe klopodis por la korea E-movado. En 1981 li estis elektita kiel la prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio kaj en 1990 refoje. Por ke la asocio havu sian oficejon kaj pli bone aktivadu, la asocio faris monokolektan kampanjon. Koreaj esperantistoj kaj alirondaj personoj aktive respondis al tio. Nun la asocio aĉetis novan labordomon.

Pri la 79-a Universala Kongreso de Esperanto okazigota en Seulo de Koreio en 1994, s-ro Han diris, ke nun ili faras preparajn laborojn por ĝi. Tamen li iom maltrankviliĝas, ĉar estas la unua fojo por ili okazigi UK. Li esperas, ke spertaj esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj helpos ilin. La 24-a Korea Kongreso de Esperanto estis okazigita jam en oktobro de 1992.

S-ro Han diris, ke nun multaj homoj ankoraŭ ne scias la lingvon Esperanto. Ankaŭ multaj junuloj ne scias, ke Esperanto estas tre utila lingvo. Li opinias, ke instruado estas la unua grava afero por disvolvi E-movadon. Oni devas funkciigi diversajn E-kursojn por elkulturi fervorajn kaj kapablajn esperantistojn. La Korea Esperanto-Asocio funkciigis tian kurson. S-ro Han foje refoje emfazis ke oni ne povas okazigi UK, se oni ne scipovas paroli Esperanton.

Ĉiujare junaj esperantistoj de Japanio kaj Koreio okazigas seminarion, alterne en ambaŭ landoj, en 1992 en Koreio, kaj ĉi-jare en Japanio. S-ro Han esperas, ke ĉinaj esperantistoj aliĝos al ĝi. Li montris, ke Ĉinio kaj Koreio distancas unu de la alia sufiĉe proksime, tamen pro historia kaŭzo, la kontakto inter la du landoj ĉesis por multe da jaroj, kaj ankaŭ la esperantistoj de la du landoj suferis de tio. Ĉi-foje preskaŭ 200 koreaj esperantistoj volis partopreni la 5-an Pacifikan Kongreson, tamen nur 40 el ili realigis sian deziron. Li kredas, ke plimultiĝos la kontaktoj inter la koreaj kaj ĉinaj esperantistoj post la starigo de la diplomaciaj rilatoj de la du landoj.

Nur kelkajn tagojn post la Pacifika Kongreso, Koreio kaj Ĉinio oficiale starigis diplomaciajn rilatojn. Tiam s-ro Han estis survoje al sia hejmlando. Aŭdinte la novaĵon, li tre ĝojiĝis kaj tuj sendis al mi poŝtkarton. Sur ĝi estas skribite: Nia renkontiĝo certe plioftiĝos!"

Tion atendas li, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj de la du landoj.

ESP-NOVAĴOJ

● De la 1-a ĝis la 5-a de oktobro 1992, en la Unua Foiro por Ĉinaj Maljunuloj, la redakcio de EPĈ faris konsultiĝon pri Esperanto en la parko Ditan de Pekino. En ĝi junaj kaj maljunaj samideanoj servis kiel konsultantoj. Inter ili iuj aĝis pli ol 80 jarojn. Per tio oni propagandis nian lingvon kaj plivastigis ĝian influon, ke konsultantoj esprimis sian deziron lerni ĝin.

● Septembre de 1992, japana esperantisto s-ro Ueda Tomohiko, prof. de la Virina Universitato Showa, vizitis ĈEL kaj la redakcion de EPĈ. Tiam li gvidis studentinojn de la universitato por lerni en la aŭtuna perfektiga kurso de la ĉina lingvo funkciigata en la Pekina Universitato.

● La unua telefono de Ĉinio por konsultiĝi pri Esperanto ekfunkciis en Shenyang (Ŝenjang), la ĉefurbo de Liaoning-provinco, la 6-an de septembro 1992. Per la telefono oni senpage servas al diversrondaj personoj de la urbo, kiuj interesiĝas pri la lingvo. La telefonon liveris esperantisto Li Liang.

● En la 13-a de septembro 1992, invitite de la Liaoning-a Ekonomika Radiostacio, esperantistoj Wang Renhu (Ŭang Ĵenhu) kaj Li Liang prezidis la

programeron Hodiaŭa Granda Amuzejo kune kun ĝia parolisto. En duonhoro ili konigis Esperanton al la aŭskultantoj.

● La libroservo Verda Stelo ekfunkciis en la 1-a de septembro 1992 en Shenyang. Ĝi apartenas al la Nordorienta Grupa Kompanio Verda Stelo kaj vendas ĉefe Esperantajn librojn kaj gazetojn.

● En januaro ĉi-jare, la Zhongshan(Ĝongŝan)-a Medicina Universitato de Guangdong finis la Esperantan kurson, kiu komenciĝis en septembro de la pasinta jaro. En ĝi lernis 18 lernantoj.

● La 22-an de majo 1992 estis registrita en la Ministerio de Justico de la Respubliko Belorusio la Statuto de la Asocio Esperantista de la Respubliko Belorusio (AERB). La registriĝo okazis dank' al la klopodoj de la aktivuloj el la E-kluboj "Bonvenon" (Minsk) kaj "Espero" (Grodno). Tio estis jam la kvara provo oficialigi E-movadon en Belorusio. La unua provo estis entreprenita ankoraŭ en la jaro 1957. La prezidantino estas Volkova Leonarda Miĥajlovna. Ŝia adreso: 230036 Grodno, Ul: 40 Let Pobedy, 6-2.

● La 2-an de julio 1992 en Minsk estis kunvokita tuturba kunveno de e-istoj. Dum la kunveno estis decidite organizi tuturban E-organizaĵon, kiel filion de AERB, elekti estraron

kaj kontrol-revizian komisionon.

● Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz sendas du librojn de Allan Kardec, koniginto de Spiritismo: La Libro de la Spiritoj kaj La Libro de la Mediumoj, kaj Almanakon Lorenz, kontraŭ jarkotizo de 30 dolaroj aŭ respondkuponoj. Adreso: Caixa Postal 3133, 20001 Rio de Janeiro, Brazilo.

● Nova E-gazeto "KOMENCANTO" nun aperas. La gazeto estas dediĉita speciale por korespondaj kursanoj kaj komencantoj-e-istoj. Ne nepre por junaj aŭ lernojaraj, sed por ajna aĝo de dezirantoj por lerni kaj praktiki nian lingvon. "KOMENCANTO" laboros por tiuj esperantistoj, kiuj ne ĉiam havas eblon kontakti spertan e-iston aŭ e-istan medion kaj trovi respondojn al siaj demandoj lige al Esperanto. La adreso: P.O. Box 132, EKATERINBURG, 620041, Rusio.

● La 76-a Brita Kongreso de Esperanto okazis de la 17-a ĝis la 20-a de majo 1992 en Sheffield. Ses aktivuloj prelegis kaj s-ro William Auld gvidis la Verkigan Laborgrupon pri Poezio.

● La 77-a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Hamiltono, Lanarkshire, de la 28-a ĝis la 31-a de majo 1993. Hamiltono estas bona loko por esplori sudan Skotlandon kun ĝiaj belaj pitoreskaj kaj interesaj vidindaĵoj.

La Libroservo Verda Stelo



Lernantoj de la Esperanto-kurso en elementa lernejo de Changji, Xinjiang



Unu libro pri Japanio kaj la alia pri optimismo

de IVAN KO

NESENDITAJ LETEROJ EL JAPANIO, verkita de Spomenka Štimec, eldonita de Hukuoka Esperanto Societo, 65 p., prezo neindikita.

En Esperantujo apenaŭ troviĝas libro verkita de ne-japana esperantisto pri Japanio. Jen estas verko skribita de jugoslava esperantistino rilate al ŝiaj spertoj dum ŝia mallonga restado en Japanio en la jaro 1988. La libro donis diversajn informojn pri kelkaj japanaj urboj, kiujn la verkistino vizitis, kaj pri la kontaktoj, kiujn ŝi havis kun japanaj geesperantistoj. Interalie ŝi rakontis, kiel ŝi planis viziti en Hukuoka s-ron Mori Singo, kun kiu ŝi korespondis 24 jarojn. S-ro Mori Singo estis direktoro de botanika kaj besta ĝardeno de Hukuoka, kaj li skribis kuraĝigan leteron al Spomenka Štimec, kiu tiam estis 16-jara junulino kaj ĵus komencis lerni Esperanton. Post iom pli ol du jardekoj ili ambaŭ renkontiĝis kadre de la Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Pekino en 1986. Tio estas neordinara epizodo por ordinara homo.

Bedaŭrinde tiu verko estas tre mallonga. Se ne, ĝi fariĝus sendube pli interesa kaj leginda.

LA OPTIMISTO-BIBLIO DE KARLO BOLO, tradukita de

Hermano Bermano el la germana lingvo, eldonita de Esperanto-Centro, Paderborno, Germanio, 163 p., prezo neindikita.

Verŝajne ĝi estas libro por optimistoj, tamen ĝi celas inspiri ideojn, kiuj kondukos la legantojn al pli pozitiva kaj ekvilibra vivado. Duono de la libro konsistas el bildoj, kaj sur ĉiu bildo troviĝas du animaloj, kiuj interparolas, kaj la alia duono konsistas el tekstoj. La teksto sur unu paĝo konsistas ĝenerale el kvar partoj. La unua parto estas frazo en formo de konsilo aŭ maksimumo presita per grasaj literoj. La dua parto estas plua ekspliko pri la unua. La tria parto donis tri simplajn regulojn por ĉiutaga pensado kaj agado de la legantoj. La kvara parto konsistas nur el unu frazo, kiu servas kiel ekspliko pri la unuaj tri partoj.

Multaj el la sentencoj en la libro enhavas en certa grado filozofian rezonadon, ekz., "Feliĉon oni ne povas trovi, ĝin oni devas krei por si", "Optimismo estas la kredo, kiu kondukas al sukceso" kaj "Perdi ofte signifas gajni". La tuta libro estas presita per pli grandaj literoj ol ordinara, kaj tio helpas malstreĉi la okulojn de la legantoj. Enŝteliĝis en la libron nur malmulte da pres-eraroj. ■

bk. angle aŭ Esperante. Adr.: 3622 Manchaka Rd. 133, Austin, TX 78704, USA.

*Mi havas 10 pecojn da nigra-blankaj Esperanto-legosignoj kaj deziras interŝ. kondiĉe 1 peco kontraŭ 2 bildkartoj koloraj uzitaj, sed ne difektitaj el la tuta mondo. Adr.: S-ro Stepan Turcinek, Tolsteho 19, 746 01 Opava, Ĉeĥoslovakio.

*Sergeo Golovenkov, 33-j., dez. kor., interesiĝas pri kulturo de Orienta Azio kaj kolektas alilandajn monerojn. Adr.: Aktau 27-32-83, SU-466200 Kazakstan.

*Tuja Sainnjambu, 18-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Mongolio, Ĉ Ulan-Batoro-44, 50000-domo 19, Orc-6 pordo No72.

*Bruno Gasparini, 13-j., ŝatas muzikon, kinon, teatron, literaturon, sporton kaj diversajn temojn, kolektas poŝtmarkojn kaj monpapirojn. Adr.: R. Ria de Sanevia 1457, 16900 Andradina-SP-Brasil.

*Kuracistino el Pollando invitas esperantistojn al sia somera kampara domo, kiu nomiĝas "Esperanta Domo por Ĉiuj". Estado preskaŭ estas senpaga. Freŝa aero, verda herbo, en centra Pollando. Adr.: Teresa Jankowska, ul. Iwicka 40 m. 18, PL-00-735 Varsovio, Pollando.

*Patricia Pawlyk, 30-j., interesiĝas pri pentrado, ĵonglado, vojaĝado kaj subakvumado. Adr.: Graf-Stauffenberg-Str. 1, D-W 5300 Bonn 1, Germanio.

*Sergei Grishenko, 20-j., interesiĝas pri politiko, filmoj, lingvoj kaj literaturo, kolektas librojn, revuojn, poŝtkartojn, mapojn kaj sonbendojn. Adr.: P.O. Box 6687, Zaporozhye 330123, Ukrainio.

Du oficialajn Esp-klasojn en publika bazlernejo instruas S-ino Adrienne LE DREE. Ŝiaj klasoj deziras korespondi tutmonde. Adreso: Carver Middle School, 801 E. 133 Place, Chicago, IL 60627, Usono.

Rekonstrui la hejmlokon

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LIU SIGONG

EN la frua somero de 1991, tre malofta inundo trafis ĉinan teron. 18 provincoj kaj municipoj malsamgrade suferis de la katastrofo. 4/5 de la tero de Anhui-provinco estis atakitaj de la superakvego kaj estis perditaj almenaŭ 10 miliardoj da juanoj.

Maltrankviligante pro la katastrofo, popoloj de kelkdek nacioj el pli ol 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj helpis la suferantojn per mono aŭ materialoj. Dank' al la subteno, la popoloj en la regionoj trafitaj de la natura katastrofo komencis en rekonstruadon de la hejmloko.

Domo por elementa lernejo konstruita post katastrofo



Unu jaron post la katastrofo, mi vizitis iujn regionojn de Anhui kaj Jiangsu (Ĝjansu), peze atakitajn de la inundo. Kion mi vidis? Sude kaj norde de Huaihe-rivero, ĉe la bordoj de la antikva Granda Kanalo, sur la vastaj kampoj suferintaj de la inundo, mi vidis ore ondantan rizon. Aŭtuna vento de tempo al tempo alportis aromon de rizo. Sur la ruino de domoj aperis vilaĝoj laŭ plano. En la vilaĝaj fabrikoj trafitaj de la superakvego funkciis novaj maŝinoj. El la infangardenoj, mezaj kaj elementaj lernejoj denove aŭdiĝis ĝoja rido kaj voĉlegado...

LA UNUA SEMADO POST LA INUNDO

Atakite de la katastrofo la fekundaj kampoj fariĝis dezerto. Detenante sin de la ĉagreno, la kamparanoj riparitis domojn, plugis teron, sterkis la kampojn kaj semis poligonon, fazeolon kaj aliajn. En iuj lokoj la plantaĵoj mortis pro varmega suno, oni do resemis foje refoje. Iu vilaĝo aĉetis de aliaj lokoj grandan kvanton da semoj de rafanoj kaj ĉinaj brasikoj, por ke ĉiu familio kulturu unu mu-on da rafanoj kaj 0.5 mu-on da ĉinaj brasikoj (1 mu-o egalas 1/15-hektaron). En la tuta vilaĝo ĉiu terpeco estis prisemita.

“Sen greno la popolanoj maltrankviliĝas, sed nur kun greno la kamparo ne riĉiĝas.” Jen la konkludo farita de la kamparanoj, post kiam ili resumis spertojn post la inundo. Laŭ tiu ĉi konkludo Fengtai-gubernio de Anhui-provinco reguligis la strukturon de agrikultura produktado ekde la aŭtuna semado en 1991, t.e. turni agrikulturon por manĝado en tiun por riĉiĝo. Unu jaron post la inundo, la gubernio ekspluatis 14 ekonomiajn regionojn kaj 6 gravajn produktajn bazojn, kultivis 200 000 mu-ojn da bon-rasa rizo, 20 000 mu-ojn da legomoj, 3 000 mu-ojn da fruktarboj kaj 200 mu-ojn da morusarboj; kaj

S-ro Sun Duoxian, guberniestro de Fengtai, en kamparana familio



kreskigis fiŝojn kaj krabojn en bredejo de 60 000 mu-oj kaj 300 000 kuniklojn.

Sekve de la naskiĝo de komercaja agrikulturo, aperis aro da agrikulturaj foiroj. El ili la foiro de kuniklo-lano ne nur altiris al si ĉinajn komercistojn, sed ankaŭ starigis komercajn rilatojn kun tiu de Hongkongo kaj Japanio. Ankaŭ la foiro de kraboj kaj aliaj akvaj produktaĵoj allogis alilandajn komercistojn.

REKONSTRUO DE “KOMERCAJA KORIDORO”

Sanhe-urbeto de Anhui-provinco de ĉiam estas loko, kie kolektiĝas komercistoj, kaj staplejo de grenoj kaj produktaĵoj akvaj kaj montaj. Tial kutime oni nomas la urbeton komercaja koridoro en la meza parto de Anhui-provinco. La 11-an de julio 1991, la inundo rompis la digon kaj englutis la tutan urbeton en 23 minutoj. Dank’ al la ĝustatempa transloĝigo kaj savado, neniu el la 19 600 loĝantoj mortis en la katastrofo.

Kiel ĉefa loko, kiun oni devis helpi kaj rekonstrui, Sanhe-urbeto refunkciigis, malpli ol unu monaton post la katastrofo, elektrodonon, akvoprovizon, telekomunikon kaj trafikon. Dank’al la en- kaj eksterlanda helpo, Sanhe-anoj konstruis du vilaĝojn, unu instruan domon por elementa lernejo kaj unu amasloĝejon por mezlernejoj, kaj rekonstruis la urbetan hospitalon.

Por disvolvi la komercan superecon kaj intensigi la vigecon de la merkato de la antikva urbeto, Sanhe-anoj donis grandan atenton al kelkaj specialaj bazaroj. Ili jam finkonstruis bazaron de podetalaj komercaĵoj kun areo de 10 000 kvadrataj metroj; 15 000-kvadratmetra foiro de greno kaj oleo estas en konstruado; ili ankaŭ pligrandigis la bazaron de

bambuo kaj ligno por ke ĝi respondu al tiu de konstruaj materialoj; la konstruado de la foiro de plumo estas en preparo kaj la Sanhe-a komerca domo kun areo de 6 000 kvadrataj metroj estas konstruata. Tute nova “komercaja koridoro” aperigos sian prosperon en Sanhe-urbeto.

“NI VIVAS EN BONA TEMPO”

La urbo Xinghua (Ŝinghŭa), Jiangsu-provinco, plej serioze suferis de la inundo, 80% de ĝia tero estis englutitaj de la superakvego. Unu jaron post la katastrofo, kiam mi iris sur la tero de Xinghua, mi vidis anstataŭ budoj kaj boatoj sur akvo, en kiuj vivis la suferantoj sistempe, vicon post vico da brik-

domoj. Ĉie en la urbo regis paco kaj trankvilo.

Dum la hejmo-rekonstruado, krom monhelpo, la magistrato de Xinghua helpis al la suferantoj sin liberigi de la malfacila situacio, per liberigo de imposto por materialoj, asekura kompenso ktp. Dank' al la monhelpo de la Unuiĝintaj Nacioj (UN), iu urbeto, suferinta plej serioze de la inundo, konstruis la vilaĝon Lianyi (Ljanji) kaj enloĝigis 65 familiojn. Mi intervjuis katastrofiton Wang Yongfu (Ŭang Jongfu). La familio Wang havas 4 anojn. Li kaj lia edzino estas pli-ol-60-jaraj kaj li mem malsanema. Ili vivas ne bone. Iliaj 2 adobdomoj estis faligitaj de la inundo. Kiam la tuta familio ĉagreniĝis pro tio, la magistrato enloĝigis ilin en novan 3-ĉambran domon. La maljunulo diris al mi: "Ni vivas en bona tempo, alie ni neniel povos vivi en la estonteco."

LA SUPERAKVEGO FORPORTIS MALNOVAN KONCEPTON

La pitoreska Fengtai-gubernio estas riĉa je mineraloj, sed la loĝantoj vivis longe de helpaj greno kaj mono de la ŝtato. Antaŭe, ili senfare pasigis la tempon, anstataŭ ŝanĝi sian malriĉecon. La inundo vekis la Fengtai-anojn el la malfavora situacio. Dum la batalo kontraŭ la katastrofo iuj vilaĝaj entreprenoj de Guangdong, Tianjin(Tjanĝin) kaj aliaj lokoj oferdonis al ili manĝaĵojn kaj ĉiutagajn bezonaĵojn produktitajn de ili mem. Ricevinte tiujn donacojn, multaj Fengtai-anoj pensis en si: "Ili estas kamparanoj, ankaŭ ni estas tiaj. Kial ili estas riĉaj, sed ni ne? Mankas al ni kreiveco, jen la kaŭzo." Sekve, la respondeculoj de la gubernio decidis, ke ili mem eksigis, se la ekonomio de Fengtai-gubernio ne disvolviĝis rimarkinde en la venontaj tri jaroj.

Gvidate de ili, la Fengtai-anoj sin ĵetis en la rekonstruadon de sia hejmlando. Unu jaron poste, en la gubernio starigis 19 000 novaj loĝdomoj, 30 instruaj domoj, 10 hospitaloj kaj domego kun 3 000 program-regaj telefon-lineoj; kaj 110 000-volta transformatoro ekfunkciis.

La centra vilaĝo Maoji(Maŭĝji) de la gubernio estas tiu de sciencoj kaj teknikoj. Dank' al la politiko multe favora al altklasaj teknikistoj, la vilaĝo engaĝis en nur 7 monatoj 27 profesorojn kaj altrangajn teknikistojn el la tuta lando. Ili starigis post la inundo 7 fabrikojn kaj la produktovaloro de la unuaj 5 monatoj atingis 1.6 milionojn da juanoj. En 1992 Chengbei-vilaĝo ekfunkciigis 4 entreprenojn. La pelelo produktita de la vilaĝa bierfarejo ne kovris la bezonon de la merkato.

RIPARO DE DIGO KAJ KONSTRUADO DE AKVOBARAĴO

En la batalo kontraŭ la inundo en 1991, la akvoadministrataj konstruoj ludis gravan rolon, sed oni rimarkis, ke kontraŭinundaj instalaĵoj de multaj lokoj ne povis bone rezisti kontraŭ la inundo. Post



Riĉa rikolto de lotusradikoj

la superakvego, ĉu en la regionoj trafitaj de la inundo, ĉu en tiuj ne suferintaj de ĝi, oni konstruis akvoadministratajn ekipaĵojn. Sur la 30-kilometra digo de Huaihe-rivero en Shouxian(Ŝouŝĵan)-gubernio, Anhui-provinco, batalis pli ol 80 000 homoj por plifirmigi la digon. Ili plejparte estis loĝantoj el la regionoj trafitaj de la inundo. Ili laboris entuziasme kaj tutforte.

Kiam mi venis al la konstruejo de Xiashankou(-Ŝjaŝankoŭ) en la gubernio, oni plivastigis la riverujon. Xiashankou estas la plej mallarĝa pasejo en la meza parto de Huaihe-rivero. Dum la inundo la fluo estas grave barita, kiu torentas poste tre rapide kun granda niveldiferenco. La ŝtato investis 300 milionojn da juanoj por plilarĝigi la pasejon de 400 metroj al 600. Tio ludos gravan rolon en la forigado de inundo en la meza parto de Huaihe-rivero. Laŭ la plano la konstruado finiĝos en 3 jaroj.


Iuj opiniis, ke la inundo vanigis la esperon de la regionoj serioze trafitaj de la katastrofo por iri al la bonhava socio, sed la Anhui-anoj kategorie diris, ke ili finos rekonstrui sian hejmlokon en 2-3 jaroj por bonvenigi la 21-an jarcenton. ■



Aŭtuna rikolto

Rikolto de breditaj kraboj





Por larĝigi Huaihe-riveron



Kamparaj knabinoj en foiro



En kamparana korto

POR BRIDI FUMA-POLVAN KAJ BRUAN POLUCION EN ĈINIO

En 1991 Ĉinio difinis 517 kvartalojn kun areo de 1 518 kvadrataj kilometroj, kie la fuma-polva polucio estas bridita, kaj 438 kvartalojn kun areo de 1 046 kvadrataj kilometroj, kie son-intenseco estas sub la normo.

Por bridi la median polucion en la urboj, koncernaj departementoj aktive konstruas urbajn kvartalojn, kie la fum-polva kaj brua polucio estas bridita, tiel ke pli ol 90% de la ellasita bruo estas sub la normo.

Nun Pekino, Tianjin, Shenyang, Hangzhou, Fuzhou kaj Dalian jam atingis la normon. La aktivado por bridi fuma-polvan kaj bruan polucion estas farata ankaŭ en tri kvartaloj de la ĝardena urbo Suzhou, tiel ke la fumkvanto ellasita de 90% de la tieaj fornegoj, bakujoj kaj industriaj instalaĵoj estas sub la normo.

ĈINA SENILEC-PROKRATA ESPLORCENTRO

La problemo pri vivolongigo estas ĉiam zorgata. La ĉina senilec-prokrata esplorcetro, fondita kune de la Ĉina Instituto pri Korpa Scienco kaj la Scienc-Teknika Komitato de Nantong, estas destinita por studi pri longigo de la homa vivo.

Ekde aprilo 1990, kiam la centro ekfunkciis, ĝi jam kuracis proksimume mil pacientojn, inter kiuj iuj estis el Japanio, Tajlando kaj Singapuro.

Nun estas malsamaj opinioj pri la kaŭzo de la senileco kaj metodoj por prokrasti la senilecon. S-ro Yu Fu, direktoro de la centro, faris klinikan observadon kaj esploron pri 825 kazoj kaj opinias, ke la perturbo de mikrocirkulado estas la ĉefa kaŭzo de la frua seniliĝo.

Laŭ la tezo de Yu Fu, oni komparas aortan sango-cirkuladon kun la rivero Yangzi (Jangzi) kaj maldikajn sangvazojn kun ĝiaj branĉetoj kaj irigaciaj kanaletoj. La homaj organoj similas al parceligitaj rizkampoj. Por ke la "rizidoj" havu sufiĉe da akvo kaj nutroj, oni bezonas ne nur glatan cirkuladon de aortoj, sed ankaŭ tiun de la maldikaj branĉetoj, alie ili velkos.

Por pliiĝi la funkcion de mikrocirkulado, likvidi ties perturbon kaj garantii vigecon de la homaj visceroj, s-ro Yu Fu inventis senilec-prokratan aparaton post pli-ol-du-jara esplorado. La aparato alternigas la pozitivan kaj negativan premojn kaj sekve de tio estiĝas fiks-direkta ŝanĝiĝo de la sangocirkulado kaj plifortiĝas la mikrocirkulado. Krome, li kreis dekelkajn specojn da senilec-prokrataj medikamentoj, kiaj piloloj por plifortigi la mensan kapablon, piloloj n-ro I por rapidigi la mikrocirkuladon. Inter la mil pacientoj kuracitaj per tiuj du metodoj troviĝas iuj homoj, kies perturbo de mikrocirkulado estas forigita, kaj la sanstato de pli ol 90% de la malsanuloj pliboniĝis. Iu japano suferis de cerba atrofio 4 jarojn, sed post la

kuracado en la centro lia malsano rimarkinde mildiĝis.

S-ro Yu Fu kombinis la kuracadon kun tonikado. Laŭ la realaj kondiĉoj de diversaj personoj kaj iliaj sanstatoj, li donis al ili malsamajn kuracilojn kun la celo plifortigi la mikrocirkuladon kaj prokrasti la senilecon.

La homa vivo estas ekstreme komplika fenomeno kaj ĝiaj misteroj ankoraŭ ne estas konataj komplete. Yu Fu kaj liaj kamaradoj senlace daŭrigas sian esplorado.

LA DEVENO DE LA FAMILIAJ NOMOJ DE ĈINOJ

Laŭ koncernaj materialoj, antaŭ 4 000 jaroj en Ĉinio aperis familiaj nomoj. En la historiaj libroj troveblas 5 652 familiaj nomoj, el kiuj 3 484 estas unuideogramaj, 2 032 duideogramaj kaj 164 triideogramaj. Hodiaŭ ankoraŭ ekzistas 2 800 familiaj nomoj.

En la primitiva klana socio oni jam ekhavis familiajn nomojn. Kun la kresko de loĝantoj pliiĝis ankaŭ familiaj nomoj, ĉiuj tamen havas sian propran devenon:

I. De la nomoj gentaj kaj reĝaj. En la prahistoria periodo de Ĉinio estis tribestro Yao, kies tribo nomiĝis Tang, tial la posteuloj de Yao portis la familian nomon Tang. En Zhou-dinastio (1066-256 a.K.) estis reĝoj Wen kaj Wu. Sekve de tio inter iliaj posteuloj iuj portis la familian nomon Wen aŭ Wu.

II. De la nomoj regnaj kaj lokaj. En la antikva Ĉinio estis multaj regnoj. Iuj loĝantoj prenis la land-nomon kiel sian familian nomon, ekz. la posteuloj de la regnestro Qi (Ĉji) portis la familian nomon Qi, dum tiuj de la regnestro Lu portis la familian nomon Lu. Estis ankaŭ loĝantoj, kiuj prenis la nomon de sia loko kiel la familian. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno la ŝtatoficistoj de Qi-regno loĝis ĉe la kvar anguloj de la urbo kaj pro tio ili portis la familiajn nomojn Dongguo (orienta urbo), Xiguo (okcidenta urbo), Nanguo (suda urbo) kaj Beiguo (norda urbo) respektive.

III. De la rango kaj ofico. En la antikveco estis titoloj de ŝtatoficistoj Sima (oficiro), Situ (ŝtatoficisto respondeca pri agrikulturo kaj loĝantaro), Shuai (marŝalo) kaj Wei (ŝtatoficisto respondeca pri malsamaj aferoj en diversaj dinastioj). Iliaj posteuloj do prenis ilin kiel sian familian nomon. Estis ankaŭ multaj homoj, kiuj prenis la profesion kiel sian familian nomon, ekz., Yue (muziko), Shang (komerco), Tao (ceramiko), Tu (buĉado), Bu (aŭgurado) k.a.

IV. De bestoj kaj vegetaloj, kiaj Niu (bovo), Ma (ĉevalo), Long (drako), Xiong (urso), Yang (poplo), Liu (saliko), Bai (cipreso) kaj Hua (floro).

V. De ciferoj, kiaj Wu (kvin), Lu (ses) kaj Wan (dekmil).

VI. De nomoj donitaj de imperiestroj, reĝoj, altranguloj kaj iniciatoroj.

Novjara bildo reproduktita per karbo en Gaomi

Teksto de LI QIANG

Fotoj de YAN JIN

LA Printempa Festo estas la plej grava festo en Ĉinio, pro tio ke ĝi anoncas la komenciĝon de la nova jaro laŭ la ĉina luna kalendaro. Dum la festo oni kutimas pendigi aŭ alglui novjaran bildon. Jam en la 14-a jc. la novjara bildo aperis kiel sendependa formo de pentrarto kaj fariĝis plej ŝatata de la ĉinaj popoloj. Ne mankas teknikoj por fari novjaran bildon. Unu el ili estas tiu de la novjara bildo reproduktita per karbo en Gaomi. Gaomi, gubernio de Shandong (Ŝandong)-provinco, estas la ununura inter la pli ol 2 000 gubernioj de Ĉinio, kie oni posedas la antikvan pentrarton kaj reprodukti novjaran bildon per karbo.

En la komenco de Ming-dinastio (1368-1644), en Gongpomiao-vilaĝo de norda Gaomi vivis la familio Wang, kiu vendis kopiaĵojn de pentraĵoj de famuloj kaj freskoj de temploj por sin vivteni. Poste ili kreis la teknikon skizi per karbo bildon por reprodukti pli da bildoj. Ekde tiam disvolviĝis tiu ĉi pentrarto en Gaomi.

La nomita tekniko estas sufiĉe distingiĝa. Unue oni skizas la figuron per salikobranĉa karbo laŭ sia projekto, Poste metas paperpecojn sur la skizon por fari reprodukon. Sur la sama paperpeco kun la skizita figuro oni povas fari kelkajn kopiaĵojn. Oni ankaŭ povas paŭsi sur la diafanaj paperpecoj per karbo, kaj refoje meti paperpecojn por kopii la bildon. Tiele, oni povas ne nur plimultiigi kopiaĵojn, sed ankaŭ havi simetriaĵojn bildojn.

Por kolorigi la bildon necesas fari pli ol dek laborprocedojn. La novjara bildo reproduktita per karbo, ĝenerale, havas sur si unu aŭ du homfigurojn kun simpla intrigo kaj sen fono. La artistoj grandkadre kolorigas la bildon, eĉ la konturon per unu streko, kio plene montras ilian senĝenecon. Ni prenu la novjaran bildon "Babilas Bofratinoj" kiel ekzemplon. Oni skizis per kelkaj strekoj la skarpon, veston, jupon, longan harplektaĵon kaj hararon antaŭ la frunto, kiuj vivece prezentas la elegantecon kaj esprimojn de la du bofratinoj.

Kun senĝenaj strekoj kontrastas la atentema


prilaborado. Por plibeligi la figuron, oni devas zorgeme ŝminki la vizaĝon, delikate desegni la brovojn, okulojn kaj buŝon, poste ilin kolorigi kaj briligigi, tiel ke la vizaĝo aspektas diafana kaj delikata. Tian efekton ne donas alispecaj novjaraj bildoj. Ekz. la novjara bildo "Ludi Volanon" aparte altiras la atenton per la vizaĝo de la knabino: La brovoj en salikfolia formo, brilantaj okuloj riĉaj je esprimoj, ruĝaj lipoj iom malfermitaj kaj vangoj rozkoloraj.

Plej allogas peklita rafano kun gravurita floro sur ĝi. Por intensigi la efekton artistoj gravuras floron sur sekigita peklita rafano kaj trempas ĝin en farbo, poste ili stampas la gravuraĵojn per ĝi sur la vesto, jupo kaj pantalono de la homfiguro, kiuj fariĝas pli okulplaĉaj.

Dum la Printempa Festo oni pendigas aŭ algluas sur muro aŭ pordo de la ĉambro novjarajn bildojn, kiuj temas pri feliĉo, bonaŭguro, longeviveco kaj riĉiĝo; aŭ pri legendo, mito, religio, floro, besto kaj birdo, belulinoj kaj infanoj, sume 150 specoj. Ekz. "Riĉiga Dio" montras la deziron de la popolo pri riĉiĝo, "Liuhai Ludas kun Ora Bufo", "Ĝojaj Karnodikaj Infanetoj" reflektas la amon de virinoj al infanetoj. Artistoj per novjara bildo benas popolojn kaj trovas ilian ŝaton, pro tio la pentrarto de novjara bildo reproduktita per karbo ekzistis jam 500 jarojn.

La apliko de la eŭropa presarto en la nuna tempo malhelpis la prosperon de la ĉinaj manproduktitaj novjaraj bildoj. En Gaomi pli kaj pli malmultiĝas artistoj pri novjara bildo reproduktita per karbo. 79-jara Wang Xishan (Ŭang Ŝiŝan) en Zhenjiatun (Ĝengjiatun)-vilaĝo estas unu el ili. Por rezervi tiun popolan heredaĵon li instruis sian nepinon Wang Suhua (Ŭang Suhŭa) kaj sian nepon Wang Suguo fari novjaran bildon reproduktitan per karbo. Ili povas krei ordinarajn novjarajn bildojn, tamen Wang Xishan kapablas fari grandamplaksan bildon kun la figuro de la riĉiga dio.


Nun pli kaj pli multe da artistoj, specialistoj, erudiciuloj donas sian atenton al la novjara bildo reproduktita per karbo en Gaomi kiel kultura heredaĵo. Kredeblas, ke tiu antikva popola pentrarto pli kaj pli prosperos. ■




S-ro Wang Xishan en pentrado



"Teatra Rolo"



"Babilas Bofratinoj"



"Riçiga Dio"

MI estas ĉiĉeronino de la Ĉina Internacia Turisma Servo. Hodiaŭ mi proponu al vi la itineron A — Pekino-Xi'an-Ŝanhajo kaj gvidas vin kun granda plezuro.

Vi vidos min tuj ĉe la surteriĝo en Pekino, kaj poste vi estos kondukata de mi al la Imperiestra Palaco kaj Somera Palaco.

La Imperiestra Palaco, nomata "La Malpermesita Urbo", sidas en la koro de Pekino. Ĝi estas la plej grandioza antikva konstruaĵaro de Ĉinio. En la 492 jaroj de 1420 ĝis 1911, 24 imperiestroj loĝis kaj plenumis la oficon en la palaco. En la imponaj konstruaĵoj de la palaco eksponiĝas sennombraj juveloj, kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de famuloj. En la palaco estas 9 999.5 ĉambroj. Eble vin interesos la 0.5 ĉambro. Ĉu vi ne volus serĉi tiun duonĉambron kune kun mi? Kaj krome, vi aŭdos multajn interesajn rakontojn pri la imperiestroj kaj iliaj familianoj.

La Somera Palaco estis somerumejo de imperiestroj. Ĝi sidas sub monto kaj frontas al lago. Diversaj domoj, pavilonoj, pagodoj, steleoj kaj ŝtona ŝipo faras la palacon nekompareble bela. La imperiestra patrino Cixi (Ciŝji), la fakta reganto de la lasta periodo de Qing(Ĉing)-dinastio (1644-1911), tre ŝatis loĝi tie en sia maljuneco. En la palaco estas ŝia luksa loĝejo Leshoutang kaj la Granda Teatro ekskluzive por ŝi. La Budha Turo Foxiangge (Foŝjangge) kaj la lago Kunming estas turismaj emblemoj de Pekino.

En la dua tago vi venos al la Granda Muro kaj la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio.

Honorita kiel miraklo de la mondo, la Granda Muro ĉiam altiras al si rigardantojn. La parto de la Granda Muro ĉe Badaling de Pekino eble estas la plej

ITINERO PROPONITA

Septaga itinero A — Pekino- Xi'an-Ŝanhajo

de **GUAN LI**

fama. Tiu parto estis konstruita en Ming-dinastio (1368-1644), kaj restas sendifekta. Oni povas atingi la plej altan gvatturon per grimrado aŭ telfero. Rigardante de la plej alta loko de la Granda Muro, vi vidos kontinuajn ĉenojn da montoj kaj la parton de ĝi serpentumantan sur la montoj. Vi estos adorklinita de la grandiozeco de la muro.

Reveninte de la Granda Muro, vi vizitos la Dek Tri Maŭzoleojn, la tombejojn de 13 imperiestroj de la dinastio. La surteraj konstruaĵoj de la maŭzoleoj estas bone konservitaj. La katakombo de maŭzoleo estas prifosita kaj malfermita al la publiko. Ĝi kovras 1 195 kvadratajn metrojn. En la kriptoj kuŝas imitaĵoj de la ĉerkoj de la imperiestro Wanli kaj liaj du edzinoj. La maŭzolearo estas ĉirkaŭita de montoj en tri flankoj. Tie vi vidos la plej grandan ŝtonan arkaĉon en Ĉinio. De tie komenciĝas la Dia Vojo longa je 750 metroj. Ambaŭflanke de la vojo gardas ok paroj da ŝtonaj leonoj, elefantoj, kameloj, ĉevaloj kaj korteganoj.

En la tria tago vi vizitos la Ĉielan Altaron konstruitan en 1420. La altaro estis loko, kie la imperiestroj petis dian benon por riĉa rikolto. La preĝhalo de la altaro altas 38 metrojn. Ĝia konusa tegmento kun triobla alero estas tegita per indige glazuritaj

tegoloj. La tegmenton subportas 28 kolonoj simbolantaj la kvar sezonojn, la dek du monatojn kaj dek du tempetojn (En la antikveco ĉinoj dividis unu tagnokton egale en dek du tempetojn). La pavimero en la centro de la planko en la halo estas marmora kun belaj vejnoj, kiuj ekscitos vian imagon pri drako kaj fenikso. Supre la kasonoj de la plafono estas bunte farbitaj.

Kredeble vin interesos ankaŭ la ronda Eĥa Muro. La muro povas koncentri kaj reflekti la sonon. Kiam iu parolas al la muro, alia povas klare aŭdi la parolon trans ĝi. Lia sono reflektiĝas plurfoje sur la arka muro. Ankaŭ la Trieĥa Ŝtono kaj la Ronda Teraso estas vidindaĵoj, kiuj aŭdigas eĥon.

La kvaran kaj kvinan tagojn vi pasigos en Xi'an (Ŝji'an), kaj en la lastaj du tagoj vi vizitos Ŝanhajon. La artikoloj pri Xi'an kaj Ŝanhajo aperos poste en nia gazeto. Sed nun mi povus malsekretigi al vi, ke la sekvanta artikolo konigos al vi la terakotajn ĉevalojn kaj militistojn de la Unua Imperiestro de Qin(Ĉin)-dinastio (221-206 a.K.).

Pekino estas la ĉefurbo de Ĉinio. Pro la kontinenta klimato, klare diferencas la kvar sezonoj de la jaro. Laŭ mia prefero, printempo kaj aŭtuno estas la plej taŭgaj sezonoj por via vizitado.

En Pekino estas tre multaj hoteloj luksaj kaj neluksaj, ekzemple la kvinstela "Palaco", la kvarstela "Ĉinio" kaj la dustelaj "Huadu" kaj "Yanxiang (Janŝjang)". Vi trovos taŭgan hotelon laŭ via prefero. Vespere vi povos ĝui pekin-operon, varieteon kaj akrobataĵojn aŭ fari aĉetadon.

La vojaĝo laŭ tiu ĉi itinero estas agrabla, komforta, interesa kaj nelaciga. En unu semajno vi povos vidi eliton de la turismaj vidindejoj de Ĉinio. Kaj krome, la itinero ne estas multe pagiga. ■

Malnova strato en malnova urbeto

Teksto de HU NING

Fotoj de LIU SIGONG

HUANGSHAN-monto estas unu el la plej famaj turismaj lokoj de Ĉinio, kaj Tunxi (Tunŝji) ĉe la piedo de la monto estas tre bela antikva urbeto. En la urbeto la plej fama estas movoplena Laojie-strato (Laojie en la ĉina lingvo signifas malnovan straton). La strato formiĝis antaŭ 500 jaroj, kun longo de 1.5 km kaj larĝo de 5 km. Ambaŭflanke de la strato staras centoj da butikoj. La fasadoj de la butikoj, metiejoj kaj loĝdomoj estis konstruitaj nur el brikoj kaj ligno. La nigraj tegoloj, elstaraj gabloj, farbitaj kolonoj kaj strato pavimita el ŝtonaj platoj, ĉio estas distingiĝa per la propra stilo de la loko.

Oni diras: "Tunxi belas pro la malnova strato, kaj la strato belas pro la malnovaj butikoj." Ĉe la strato estas pli ol dek famaj butikoj, malfermitaj antaŭ duonjarcento, kiaj apoteko, butikoj de peklaĵoj, butikoj de skribilaro, vendejo de pesilo... En la orienta parto de la strato funkcias 128-jara apoteko de ĉina medicino. La apoteko estas tre profunda kaj provizita per longaj servotabloj. Post la ĉambro estas korteto ŝirmita per difanaj tegoloj el frotitaj konkaj de rivermituloj. Ekster la servotabloj estas kvar paroj da antikvaj lignaj apogseĝoj, kaj maljuna kliento sidis tie. Atendante li rigardis, kiel drogisto pesas drogojn per pesileto. Li venis de loko 5 km. fore por aĉeti medicinaĵon, ĉar la butikoj havas plej

multajn specojn da drogoj bonkvalitaj.

La tradiciaj hokpesiloj kaj pletpesiloj jam ne estas uzataj en vendejoj en urboj, sed en la centjara butikoj de pesiloj en la strato oni ankoraŭ produktas kaj vendas diversajn malnovtipajn pesilojn. Kelkaj metiistoj sidis en la butikoj vizaĝe al la strato, inkrustis palisandran stangeton per aluminiuj grajnetoj kiel skalo unu post alia kaj interligis la stangeton kun pleto per nilona ŝnuro. Iu maljuna metiisto montris malgrandan pesilon kun ruĝa stangeto kaj ronda latuna pleto, kiu povas pesi maksimume 150 g, kaj diris al mi: "Japanaj kaj usonaj turistoj emas aĉeti tian pesilon kiel memoraĵon." Ĉe tio alilokaj turistoj venis aĉeti pesilon, kiu povas pesi maksimume 5 kg., kaj li sin turnis al ili por helpi ilin en elektado.

La elpendaĵoj de la butikoj en Laojie-strato estas tre interesaj pro loka gusto. La ideogramoj sur la elpendaĵoj de la butikoj plejparte estis skribitaj de famaj kaligrafoj. Tiuj belaj skribaĵoj ne nur akcentis la kulturan guston de la strato, sed ankaŭ donis belan memoron al la vizitantoj pri la ĉina kaligrafio.


Ĉiuj turistoj ŝatas rigardi la pejzaĝon kaj fari aĉetojn en la strato. Fremdlandaj vizitantoj tre ŝatas la urbeton kaj multe fotis la nigrajn elpendaĵojn kun oraj skribaĵoj, la malnovajn tipajn domojn de la provinco kaj la tre diversajn produktaĵojn de

la urbeto. Fama nederlanda reĝisoro s-ro Evans venis tien kun filmista grupo kaj detale filmis ĉiujn angulojn de la strato. En 1991, kiam okazis la Unua Grimpado de Huangshan-monto, tie kolektiĝis multaj ĉinaj kaj alilandaj turistoj. Nemalmultaj el ili admiris: "Surgrimpinte Huangshan-monton, oni revenas en la naturon kaj, promene sur la malnova strato, oni ĝuas antikvajn scenojn. Jen ambaŭ rikoltoj!"


La antikva Tunxi fariĝis natura studio. Ĉiujare oni filmas tie subĉielajn scenojn por pluraj kinofilmoj kaj televidfilmoj.

La malnova strato estas ankaŭ staplejo de agrikulturaĵoj kaj tre diversaj produktaĵoj. Fruprintempe, tie vendiĝas bambuŝosoj, kaj iom poste, bonodora verda teo regas en la merkato de Tunxi. De antikve la strato estas staplejo de verda teo de suda Anhui-provinco. Post vojaĝo aŭ aĉeto turistoj vizitas lunĉejon por ĝui tieajn manĝaĵojn. Vera plezuro!

La antikva Laojie-strato estas enlistigita kiel unu el la unuaj 14 ŝtataj turismaj lokoj. Nun koncerna departemento ellaboris necesajn rimedojn por ĝin protekti kaj asignis specialan monon por konstrui protektan barajon al la strato, ŝtonan ekranmuron, arkadon k.a. Antaŭ nelonge oni jam rekonstruis parton de la strato konservante la originalan fizionomion de la strato. Post nelonge ĝi certe fariĝos pli eleganta kaj pli alloga. ■



En Laojie-strato





En butiko de lokaj produktaĵoj



Juna butikistino

Malnova butiko en la strato





Naŭ bronzaj ding-oj — simbolo de regpotenco

de SHAO DONG

La ding-o Simuwu farita antaŭ 3 000 jaroj

KIEL la unua dinastio de la sklavposedanta reĝimo en la ĉina historio, la dinastio Xia (Ŝja) markis komencon de civilizita erao en Ĉinio, kaj la naŭ bronzaj ding-oj (ding-o, ĉina antikva kuirvazo kun tri aŭ kvar piedoj), mulditaj en la dinastio kaj prenitaj kiel simbolo de regpotenco, fariĝis grava mejloŝtono en la civilizacia historio de Ĉinio. Sed poste ili malaperis, kio fariĝis enigmo nesolvita dum miloj da jaroj.

LA UNUA DINASTIO EN LA ĈINA HISTORIO

Antaŭ ĉ. 4 000 jaroj multaj klanoj kaj triboj en la meza baseno de la Flava Rivero alianciĝis kiel granda unio, kiun gvidis Yao (Jaŭ). Historiistoj nomas ĝin Komunumo de Triboj de Huaxia (Hŭaŝja).

Legendo diras, ke en la tempo de Yao okazis granda inundo, kiu daŭris longtempe. Yao sendis tribestron Gun solvi la problemon. Por superregi la inundon Gun alprenis la rimedon konstrui digon. Per tiu rimedo oni batalis kontraŭ la inundo naŭ jarojn, sed vane, kaj la inundo fariĝis pli kaj pli furioza. Poste, maljuna Yao cedis la sceptron al Shun (Ŝun), kaj tiu ĉi ordonis al Yu (Ju), filo de Gun, daŭrigi la laboron por subigi inundon. Yu ŝanĝis la metodojn en forkonduko de superakvo. Post 13-jara batalo li sukcesis en la superrego. La klanoj kaj triboj en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero vivis kaj laboris en trankvilo, ke rapide disvolviĝis la agrikultura produktado. Historia libro notis, ke la vasta tero, kie Yu aktivadis, estis dividita en naŭ regionojn.

Pro sia sukceso en la venko super inundo Yu estis estimata de

ĉiuj klanoj kaj triboj, sekve pli multaj klanoj kaj triboj membriĝis al la komunumo. Poste, Shun cedis sian tronon al Yu kaj la lasta fariĝis la gvidanto de la komunumo. Post pli-ol-dekjara kunbatalado, en ĉ. 2100 a.K., Yu fondis la unuan dinastion de la sklavposedanta reĝimo en la ĉina historio, surbaze de la komunumo. La centra Ĉinio estis ĝia ĉefa teritorio. La dinastio portis la nomon Xia kun la ĉefurbo en la nuna okcidenta Henan-provinco.

Post la fondiĝo de la dinastio Xia, Yu vojaĝis suden al Tushan (Tuŝan) (ĉe la nuna Bengbu de Anhui-provinco) kaj intervidiĝis kun la tieaj tribestroj, kio markis, ke Yu deklaris Xia-dinastion fondita kaj montris sian intencon unuigi Ĉinion.

Memore al la intervidiĝo, Yu muldigis naŭ ding-ojn el bronzo tributita de diverslokaj vasaloj. Ili

simbolis, ke Ĉinio estis unuigita el naŭ regionoj, kaj servis kiel ŝtata trezoro.

LA DEVENO KAJ KARAKTERO DE DING-OJ

Kial oni elektis ding-on kiel simbolon de regpotenco? Ĉar ĝi estis unu el la plej originalaj kaj plej konataj ujoj en la civilizacio de antikva Ĉinio. La ding-oj plejparte estas rondaj, tripedaj kaj dutenilaj, kaj estas ankaŭ ding-oj kvadrataj, kvarpedaj kaj dutenilaj.

Laŭ legendo, jam en ĉ. 5000 a.K., suvereno Huangdi, la prapatro de Yu, muldigis bronzan ding-on. En la ruino de Yangshao (Jangŝaŭ)-kulturo antaŭ ĉ. 3000 a.K. en la neolitiko, nome la lasta periodo de la primitiva socio, oni trovis rondan argilan tripedan ding-on, kuirilon uzatan de antikvuloj kaj similan al la posta bronza ding-o. Ŝajne ĝi estas ding-o plej frue ekzistanta en historio.

En la socio de la sklavposedanta reĝimo, nome la Bronza Epoko, ding-o estis uzata kiel liturgia ilo.

En la Bronza Epoko ding-o estis uzata por marki rangojn kaj observi hierarkion. Laŭ la sistemo pri uzado de ding-oj, siatempe estis severaj difinoj pri posedo de ding-oj, nome, reĝo povas posedi naŭ ding-ojn, princo — sep, kortegano — kvin kaj malaltranga nobelo — nur tri. Laŭ la difino de la sistemo ĉiuj ding-oj havas saman formon kaj saman desegnon, sed en diversaj grandoj. Oni posedis ding-ojn laŭ sia rango. Havi ding-ojn en nombro super la permesita nombro estis damnita al morto. La nombro de posedataj ding-oj montris la aŭtoritaton de la posedanto. Kaj oni povas juĝi la aŭtoritaton de entombigito laŭ la nombro de kune entombigitaj ding-oj.

RAKONTO PRI LA NAŬ DING-OJ

La naŭ ding-oj, laŭ la ordono de Yu, estis lokitaj antaŭ palaco en la ĉefurbo de Xia-dinastio. Pli ol 500 jarojn poste, la dinastio Shang (ĉ. 17-11-a jc. a.K.) anstataŭis Xia-

dinastion kaj la ding-oj estis transportitaj en la ĉefurbon de Shang-dinastio. Kiam la dinastio Zhou (ĉ. la 11-a jc. — 256 a.K.) pereigis la dinastion Shang, la ding-oj estis translokitaj en la ĉefurbon de la dinastio Zhou. Poste, reĝo Chengwang (Ĉengŭang) de la dinastio Zhou oficiale fiksloki la ding-ojn en Jiaru (Ĝjaju) (proksime al la nuna Luoyang (Lŭojang) de Henan-provinco), por deklari, ke ĉio jam estas en ordo laŭ la deziro de la Ĉielo.

Estis rakonto de demando pri la naŭ ding-oj. En siaj lastaj jaroj de kadencis la dinastio Zhou kaj la princlandoj leviĝis por sendependiĝi de la dinastio kaj fari sin potenco, kaj Ĉinio eniris en la periodon de Printempo kaj Aŭtuno (770 — 476 a.K.). En 606 a.K. reĝo Zhuangwang (Ĝŭangŭang) de Chu(Ĉu)-regno, unu el la princlandoj, iris ataki iun malgrandan regnon por konkeri ĝin. Kiam la trupoj preterpasis la teritorion de Zhou-dinastio ĉe Luoyang, la reĝo de la dinastio sendis korteganon Wangsun Man saluti ilin. Princo Zhuangwang, kiu de longe intencis konkeri Zhou-dinastion, arogante demandis Wangsun Man pri la granda kaj pezo de la naŭ ding-oj hereditaj de Xia-dinastio. Wangsun Man respondis: "La kortego malprosperis, tamen la volo de la Ĉielo restas senŝanĝa. Tial oni ne devas demandi pri la ding-oj." La respondo rompita la revon de la princo pereigi la dinastion.

PERDIĜO DE LA DING-OJ

En 256 a.K. Zhou-dinastio estis pereigita de Qin(Ĉin)-regno (841 — 221 a.K.), unu el la princlandoj, kaj perdiĝis la naŭ ding-oj. Pri la kaŭzo de la perdiĝo oni povas trovi en la historiaj libroj diversajn dirojn, kaj eĉ nun ĝi estas mistero.

Inter la diversaj diroj la ĉefaj estas jenaj:

La unua estas, ke post kiam Zhou-dinastio estis pereigita, oni portis la naŭ ding-ojn en Qin-regnon. Pro oftaj militoj oni plurfoje transloki ilin kaj fine ili dron-

is en Sishui-rivero ĉe Pengcheng (Pengĉeng) de la nuna Xuzhou (Ŝjuĝoŭ) de Jiangsu-provinco. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) oni gravuris sur ŝtono serĉadon de la ding-oj. Post la unuigo de Ĉinio far la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (246 — 210 a.K. sur trono), li vojaĝis orienten al Pengcheng kaj sendis milon da homoj serĉi la ding-ojn en la rivero, sed ili ne trovis. La dua diro estas bazita sur la libro "Historia Kroniko" verkita de Sima Qian, historiisto de Han-dinastio. Sima Qian opiniis, ke en la lastaj jaroj de la Orienta Zhou-dinastio (770 — 256 a.K.), t.e., antaŭ ol ĝi estis pereigita de Qin-regno, la ding-oj jam perdiĝis. Li ne sciis, kial ili perdiĝis, sed kredis, ke tio ne koncernas Qin-regnon. Tria opinio estas, ke tute ne ekzistis la naŭ ding-oj.

Laŭ la rakonto en la libro "Historia Kroniko", la naŭ ding-oj mulditaj en Xia-dinastio estis tri rondaj ding-oj kun malplenaj piedoj kaj ses kvadrataj ding-oj, kaj ili ne estis tre pezaj, ĉar princo Zhuangwang de Chu-regno diris al Wangsun Man kun malestimo: "parteto da bronzo sur la armiloj de nia lando jam sufiĉas por muldi naŭ ding-ojn." Sed la sistemo pri posedo de ding-oj tre akcentis la gravecon de la ding-oj por la reĝo, kaj oni muldis sur ding-oj montojn kaj riverojn de la naŭ regionoj por simboli la universon; ĉio ĉi atestis, ke ding-o estas grava instrumento por simboli la potencon de dinastio. Do estas supozeble, ke ding-oj ne povis esti tro malgrandaj. Ĝis nun oni trovis neniun el la naŭ ding-oj, tamen oni ne devas facile kredi, ke la ding-oj estas nur imagaĵo.

En historiaj libroj estas tre diversaj konjektoj pri la dato kaj loko de perdiĝo de la ding-oj, sed oni legis neniun noton, ke la ding-oj estis jam detruitaj. Progreso de arkeologio kaj altiĝo de la nivelo de esplorado de historio estas tre esperigaj, ke la naŭ bronzaĵaj ding-oj kun epokfara signifo estos trovitaj iutage en la estonteco. ■



Bona natura haveno Lüsi

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de LING YOUJUAN

Abunda rikolto de fiŝoj



Ekiro por fiŝkaptado

LA haveno Lüsi (Ljusi) troviĝas ĉe la bordo de la Flava Maro, norde de la enfluejo de Yangzi-rivero, kaj rigardas al Ŝanhajo de trans Yangzi-rivero. Laŭ mito, feo Lü Dongbin siatempe kvarfoje, rajdante sur gruo, traflugis ĝin kaj estis sorĉita de ĝiaj ĉarmaj pejzaĝoj. Pro tio la haveno ricevis la nomon Lüsi (en la ĉina lingvo 'si' signifas 'kvar').

ABUNDA MARPRODUKTA RIĈFONTO

La haveno situas en la nordokcidento de la urbo Qidong, Jiangsu-provinco. Sude ĝi proksimas al Ŝanhajo, granda havenurbo de Ĉinio, kaj okcidente ĝi ligiĝas kun la haveno Nantong. Ekster la haveno estas fiŝejo de 11 mil kvadrataj marmejloj. La fiŝejoj Zhoushan, Hainan kaj Weihai, kaj Lüsi estas nomataj kvar grandaj fiŝejoj de Ĉinio.

Kiel bazloko de fiŝkaptado tie la temperaturo kaj saleco de la akvo estas konvenaj al fiŝoj, kaj en la akvo estas abunda planktono. Ĝi estas ideala mondo de multspecaj akvaj animaloj por migrado, restado, nutraĵoserĉado, generado kaj kresko. Tie troviĝas pli ol 2 000 specoj da marestaĵoj, kaj sole la fiŝoj nombras pli ol 200 specojn. La jara produktokvanto de marestaĵoj de Lüsi superas 50 mil tunojn, kvaronon de la totala produktokvanto de Jiangsu-provinco. Jen kial de antikve cirkulas la onidiro, ke la taga produktado de Lüsi egalas al la valoro de unu ora bovo.

La ĉefaj marproduktaĵoj de Lüsi estas buterfiŝo, skieno, angilo, omaro, meduzo kaj krabo. La tieaj tridakno, meduzo, purpureo estas bongustaj kaj havas grandan debiton en Japanio, Usono, Sudorienta Azio, Hongkongo kaj Makao.

En la lastaj dek jaroj la produktov valoro de fiŝkaptado de Lüsi senceŝe kreskas. Pleje distingiĝas la Urba Fiŝ-Kompanio, kiu an-

taŭe estis fiŝista vilaĝo. Antaŭ la jaro 1978, la totala produktov valoro de industrio kaj agrikulturo de la vilaĝo estis nur miliono da juanoj kaj nun jam atingis 36 milionojn. Plejparto de ĝiaj familioj el 1 500 homoj konstruis etaĝdomojn, kaj la meznombra poka-pa enspezo en unu jaro superas 2 000 juanojn (ĉirkaŭ 370 usonaj dolaroj). Nun serio da marproduktaj prilaborejoj kaj servaj entreprenoj staris en la centro kaj nova haven-distrikto de Lüsi.

Lüsi estas ankaŭ ideala haveno por ekstera komerco. Aprobite de la registaro de Jiangsu-provinco, en 1987 oni konstruis ankrejon por malgrandaj ŝipoj el Taiwan (Tajŭ'an)-provinco kaj la unuan akceptejon de la provinco por Taiwan-aj fiŝistoj. Samtempe kun tio, oni konstruis ankaŭ staplejon de malgrandsuma negoco favore al la rekta komerco kun Taiwan.

Oktoĉbre de 1989, la haveno Lüsi estis difinita de la ŝtato kiel duagrada malferma haveno, ĝia transporta kargoŝipo unufoje atingis Japanion kaj tiele finiĝis la situacio eksporti siajn akvoproduktaĵojn pere de aliaj havenoj. Nun ĝi jam posedas propran oceanan transportan ŝiparon.

ALLOGA PERSPEKTIVO DE EKSPLUATADO

Historie Lüsi famis kiel fiŝhaveno. En la lastaj jaroj multaj specialistoj faris profundajn sciencajn esplorojn kaj konfirmis, ke Lüsi fariĝos alia malofte trovebla bona natura haveno sur la ĉina marbordo, post la havenoj Dalian, Ningpo kaj Hongkongo.

5 kilometrojn norde de la haveno Lüsi paralelas kun la marbordo la ŝanelo nomata Xiaomiaohong. Ĝi longas 42 kilometrojn de okcidento al oriento kaj estas profunda kaj larĝa, tre oportuna por ŝipoj de 50 mil toneloj. 25-kilometra marbordo taŭgas por konstrui profundajn ankrejojn. Sablaĵo kun areo de pli ol 7 hektaroj horizontale kuŝas ekster la ŝanelo kiel ĝia natura ŝirmilo. La

kondiĉoj por ankrado estas tre bonaj.

Kun aparta geografia situo Lüsi posedas avantaĝajn kondiĉojn de en- kaj eliro de ŝipoj. Multaj ŝoseoj, riveroj kaj Yangzi-rivero interligas ĝin kun ĉiuj grandaj urboj laŭlonge de Yangzi-rivero. La konstruata fervojo de Xinyi (Ŝinji) ĝis Nantong trairos Lüsi kaj plifaciliĝos la komercaj rilatoj de la haveno Lüsi kun la tuta lando.

Sur la 1 000-kilometra marbordo inter la haveno Lianyungang en norda Jiangsu-provinco kaj la haveno Ŝanhajo Lüsi estas la sola haveno. La konstruado de Lüsi grave kaj profunde influos la ekonomian disvolvon de norda Jiangsu-provinco.

Krome, la ekspluatado de Lüsi moderigos trookupatecon de la naviglinio de Yangzi-rivero kaŭzitan de sabla fundo ekster la enfluejo de la rivero. Dank' al tio la haveno Ŝanhajo fariĝos havenocentro kun Lüsi en la nordo kaj la haveno Beilun de Zhejiang-provinco en la sudo kiel aloj kun kompletaj funkcioj kaj racia dispozicio. Lüsi estas ankaŭ ideala bazo por ekspluatado de la ege abunda petrolo sub la Flava Maro.

Nun Jiangsu-provinco estas intense klopodanta super planado de konstruado kaj ekspluatado de Lüsi. La proksima plano estas starigi en la ĉirkaŭaĵo de la haveno industrian distrikton de petrolo, kemio, energio kaj transportado. La ĉefa laboro estas konstrui ankrejojn por 350 mil toneloj, instalii marfundajn oleduktojn kaj surterajn cisternojn por rekte servi al la 6 grandaj petrolrafinejoj en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero, pli poste konstrui grandtipan petrolrafinejon, etilenan fabrikan kaj termoelektrajn. Laŭ la malproksima plano, la haveno Lüsi fariĝos internacia komerca haveno kun industrio, komerco kaj fiŝado kaj kun la funkcioj de transiga trafiko, turisma servo ktp. ■

LIU SHIRONG:

Eŭropa opero en Ĉinio



ESTIS agrabla vespero. La opero “La Traviata” estis ludata en la teatro de la Pekina Ekspoziciejo. Antaŭ la komencigo de la ludo iu membro de la Kultura Komitato de Britio demandis kun dubo: “Ĉu vi adaptis la romanon de A. Dumas al pekinopero?” La gastiganto respondis, ke oni ludos operon laŭ la partituro farita de la itala komponisto s-ro Giuseppe Verdi, per belkanta metodo kaj simfonia orkestro. Tamen ne solviĝis la dubo de tiu sinjoro. Kiam finiĝis la ludo kaj li suriris sur la scenejon por gratuli la direktanton kaj kantistojn, li diris: “En Britio mi ofte rigardis prezentadon de pekinopero kaj akrobataĵoj fare de ĉinaj artistaj grupoj, kaj mi pensis, ke tio estas la tuto de la ĉina prezenta arto. Estas ekster mia atendo, ke vi povas tiel bone ludi okcidentajn klasikajn operojn kiel eŭropaj operaj trupoj.”

Kial la brita amiko havis tiun miskomprenon? Oni devas konfesi, ke tion kaŭzis la nesufiĉa kultura reciprokado inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La alia kaŭzo eble kuŝis en tio, ke kulturaj personoj de Eŭropo longtempe estis katenataj de la penso “Eŭropo — la kultura centro”. En la pasintaj dekoj da jaroj mi kontaktiĝis kun multaj personoj de kulturaj rondoj de Eŭropo kaj trovis, ke ili senescepte dubis, ĉu ĉinoj povas ludi pianon, violonon aŭ kanti en

belkanta metodo kiel eŭropanoj. Kaj ili ne sciis ankaŭ, ke Ĉinio jam havas bonajn simfoniajn orkestrojn, baletajn trupojn kaj operajn trupojn. Sed ili estis konvinkitaj nur de la faktoj.

Frue en la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la kuranta jarcento, la eŭropa opero, kvankam malpli frue ol la eŭropa muziko, enkondukiĝis en Ĉinion. Tiam operon ludis enmigrintoj kaj alilandaj trupoj, kaj la rigardantoj plejparte estis enmigrintoj kaj iuj melomanoj el la ĉinaj intelektuloj. En Harbin de la Nordoriento de Ĉinio estis simfonia orkestro kaj opera trupo ĉefe el enmigrintaj rusoj. La granda pensulo kaj literaturisto Lusinotis en sia verko la prezentadon de rusa opera trupo en Pekino kaj laŭdis, ke la dancado kaj kantado de la trupo estis “ĉarmaj, honestaj kaj bravaj”. Tia prezentado estis pli ofta en Ŝanhajo. Antaŭ duonjarcento mi rigardis en Ŝanhajo la operon “La Pajacoj” de Ruggiero Leoncavallo, ĉefan verkon de verisma skolo de Italio kaj ludatan de enmigrintoj. Tiam en la ludoj partoprenis ankaŭ junaj ĉinoj. Ekzemple, voĉmuzika profesorino Gao Zhilan de la Ŝanhaja Konservatorio tiam ludis la rolon de Marguerite en “Faŭsto” de C. Gounod. Tiam kelkaj eŭropaj operaj trupoj vizitis Ŝanhajon dum sia turneo, sed la malkvieta situacio de la ĉina socio multe malhelpis la diskonigadon de opero. Ĝi disvastiĝis en Ĉinio nur post la

fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, dank’ al la paca situacio de la socio. Ĉinio ekhavis siajn proprajn ensemblojn, kiuj povis ludi famajn eŭropajn operojn en kaj eksterlande kaj inviti fremdlandajn trupojn por kultura reciprokado.


En la 50-aj kaj 60-aj jaroj Ĉinio reciprokis operludon ĉefe kun Sovetunio kaj orient-eŭropaj landoj. Sed la repertuaroj de la ĉinaj operaj trupoj estis tre riĉaj, ne sole el la verkoj de la supre menciitaj landoj. Ekzemple, “La Traviata” estis la opero unuafoje ludita en 1956 de la Ĉina Ŝtata Opera Trupo en Ĉinio post ties fondiĝo. La opera trupo ludis pli ol 300 fojojn en Tianjin (Tjanĝin), Nankino kaj aliaj grandaj urboj de Ĉinio dum sia turneo. La influo kaj la nombro de rigardantoj estis multe pli imponaj ol tiuj antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio. Kaj la sensacio estis komparebla nur kun tiu por la ludo de “Carmen”.

De 1956 ĝis 1962 la Ĉina Ŝtata Opera Trupo ludis ses operojn: “La Traviata”, la hungara opereto “Bovido”, la Azerbajĝana komika opero “La Vendisto kaj Fraŭlino”, itala opero “Damo Papilio”, ukraina “Juna Gvardio” kaj “Eŭgeno Onegino”. Tiutempe en Ĉinio fremdlandajn operojn ludis ankaŭ la operaj trupoj de Ŝanhajo kaj Wuhan (la ĉefurbo de Hubei-provinco).

En la 70-aj jaroj la influa faro de la Ĉina Ŝtata Opera Trupo estis



Sceno el "La Traviata"



Sceno el "Carmen"

la ludoj de "La Traviata" kaj la japana reprezenta opero "La Krepuska Gruo" en kunlaboro de japanaj artistoj. La opero estis ludata de japanaj kantistoj kaj ĉina infana ĥoro sub la akompano de la simfonia orkestro de la trupo direktata de japana komponisto Dan Ikuma. La prezentado estis alte taksita. La sukcesa kunludo de la ĉinaj kaj japanaj artistoj malfermis novan situacion, larĝigis la vojon por la kultura reciprokado inter Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj elokvente pruvis, ke aziaj artistoj jam bone mastras la eŭropan operon.

Ĝuste en tiu tempo la registaroj de Ĉinio kaj Francio subskribis interkonsenton de kultura reciprokado, kio kreis kondiĉojn por ludo de la franca opero "Carmen" en Ĉinio. "Carmen" estas malfacile ludebla opero, kaj tre ŝatata de la ĉinaj muzikistoj kaj melomanoj. Estis la unua fojo por Ĉinio ludi tiun kompletan operon. La franca registaro sendis al Ĉinio eminentajn specialistojn reĝisoro s-ro Rene Terrasson, direktanto s-ro Jean Perisson, voĉmuzika direktantino s-ino Jacqueline Brumaire kaj dekoristo s-ro Diego Etcheveny kaj lia edzino. Post unujara kunlaboro oni sukcesis surscenigi la operon en la Novjara Tago de 1982.

En la 80-aj jaroj ne nur la Ĉina Ŝtata Opera Trupo, sed ankaŭ la Ŝanhaja Opera Trupo ludis fremdlandajn operojn, ekzemple, "La


Bohemoj", "Cosi fan Tutti" kaj "Turandot". La Ŝanhaja Opera Arta Centro de Zhou Xiaoyan (Ĝou Ŝjaŭjan) kaj la ensemblo de Jiangsu-provinco kune ludis "Rigoletto". Poste ili kunludis la italan komikan operon "Don Pasquale" kaj verisman majstrajon "Cavalleria Rusticana".

Ĉina opera trupo ludis ankaŭ eksterlande. La Ĉina Ŝtata Opera Trupo ludis en 1988 en Hongkong "Carmen" kaj "Damo Papilio", kaj en julio de la sama jaro la trupo ludis tiujn du operojn kaj ĝia orkestro ludis rekviemon de G. Verdi kaj ĉinajn simfoniajn muzikaĵojn en la Savonlinna Opera Festivalo en Finnlando. Ver-

ŝajne eŭropanoj unufoje vidis, ke ĉinoj kaj ĉinaj orkestroj ludis iliajn klasikajn operojn en la ĉina lingvo. La arto ne konas landlimon. La ĉinaj artistoj ne nur ludis fremdlandajn operojn, sed ankaŭ kreis multajn novajn operojn kun ĉina temo. Tiuj operoj estis ludataj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj. Tiuj operoj, asimilitaj naciajn tradiciajn esprimmanierojn, havos sian paĝon en la opera historio de Ĉinio. En la estonteco, kun plioftiĝo de la kultura reciprokado inter Ĉinio kaj aliaj landoj, la eŭropa opero pli bele floru en Ĉinio. ■

ABONTARIFO DE EPC

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40



WANG YICAI:

Ĝojo de tibeta maljunulo

S-ro Pengcuo Zhaxi

PRO siaj apartaj naturaj kaj historiaj kondiĉoj, la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio situanta sur la monda tegmento portas misterajn kolorojn. Ĝi estas alloga, tamen pro tre malfacila trafiko en ĝi ĝis nun nur malmulte da homoj vizitis la lokon. Samkiel pli kaj pli multaj en- kaj eksterlandaj turistoj, mi havas ŝancon entibetiĝi por propraokule vidi ĝiajn aspektojn kaj ĝui ĝiajn ĉarmajn pejzaĝojn. Koncerne miajn sciojn pri ĝia pasintaĵo, mi devas danki tiujn afablajn kaj senantaŭjuĝajn atestantojn de la tibeta historio. Unu el ili estas maljunulo Pengcuo Zhaxi.

Ni renkontiĝis en januaro de 1992. Tiam la 67-jara Pengcuo Zhaxi ripozis en sia hejmo en Pekino pro vundo sur piedo. Li prezentis sin al mi: “Mi naskiĝis en povra tibetana familio. Ne sciante legi nek skribi, miaj gepatroj suferis dum la tuta vivo, kaj mi decidis de mia infaneco bone lerni lingvojn kaj tibetologion.” Poste lia deziro realiĝis kaj li fariĝis erudito pri tibetologio, lingvistiko, teorio de logika rezonado.

Laŭ mia peto, li rakontis al mi sian pasintecon. Kiel interpretisto de la tibeta lingvo, li partoprenis en 1951 la intertraktadon de la Centra Popola Registaro kaj la Tibeta Registaro pri la paca liberigo de Tibeto. Li diris, ke en 1951, unu jaron post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la loĝantoj de la landinterno estis ĝojaj pro la nova vivo, sed miliono da tibetaj servutuloj estis daŭre katenitaj de la kruela servuta sistemo. Tial, liberigi ilin fariĝis neŝanĝebla historia tendenco.

Marte de 1950, la Centra Popola Registaro informis al la tibeta registaro, ke tiu sendu reprezentantojn al Pekino por intertrakti pri paca liberigo de Tibeto. Kvankam la centra registaro faris multon por tio, tamen nenio rezultis. La 24-an de oktobro 1950 Ĉamdo de Tibeto estis liberigita, en novembro la tibeta regento abdikis la regentecon kaj Dalai-lamao ekestis en potenco. La 9-an de novembro, Ngapoi Ngawang Jigme kaj aliaj 40 tibetaj oficistoj kune skribis al Dalai-lamao, ke Tibeto sendu reprezentantojn al la paca intertraktado. Tiam pro konspiro de iuj skismuloj el altaj oficistoj de la tibeta registaro, la 29-an de decembro 1950 Dalai-lamao fuĝis el

Lhasa kaj januare de 1951 atingis Jadong proksime de Hindio, atendante ŝancon foriri eksterlanden. Ilia konduto estis kontraŭstarata de tibetaj popolamaso kaj lamaistoj de 3 famaj temploj Gandan, Ĝebang kaj Sela. Kaj ankaŭ nemalmultaj oficistoj kaj lamaoj, kiuj akompanis Dalai-lamaon en Jadong, kontraŭstaris al lia fuĝo eksterlanden kaj estis por la paca intertraktado kun la Centra Popola Registaro.


Ĝuste en tiu situacio, februare de 1951, Dalai-lamao nomumis Ngapoi Ngawang Jigme la unua plenrajtigita delegito de la Tibeta Registaro kaj Tudan Danda, Kajmo Sŭo’anŭangduj, Tudeng Ljemen, Sangpo Dengzegdunduj plenrajtigitaj delegitoj, kiuj konsistigis delegacion de la Tibeta Registaro kaj veturis al Pekino por la paca intertraktado kun la Centra Popola Registaro. Dalai-lamao disdonis al ĉiu el ili legitimajon.

Kiel laboranto de la Centra Komisiono pri Naciaj Aferoj, Pengcuo Zhaxi servis tiam kiel interpretisto de la tibeta lingvo.

“Kiel tibetano, mi ĝoje partoprenis tiun signifoplenan eventon kaj faris mian kontribuon al ĝi. Mi estas ĝoja kaj fiera pro tio eĉ hodiaŭ.” Rememorante la scenojn antaŭ pli ol 40 jaroj, Pengcuo Zhaxi ne povis deteni sian fieron kaj emocijon.

Li diris, ke Ngapoi Ngawang Jigme kaj liaj kolegoj atingis Pekinon en la 22-a de aprilo. La paca intertraktado komenciĝis en la 29-a de aprilo kaj sukcese finiĝis en la 23-a de majo. La delegitaro de la Centra Popola Registaro kaj Tibeta Registaro subskribis en Pekino la “Interkonsento pri Paca Liberigo de Tibeto”, kiu konsistas el 17 artikoloj.

Pengcuo Zhaxi kun ĝojo diris: “En la sekvanta tago post la subskribo de la interkonsento, prezidanto Mao Zedong akceptis la tibetan delegacion en Zhongnanhai, la sidejo de la Centra Popola Registaro, kaj sincere diris: “Dank’ al la penado, vi, delegitoj de ambaŭ flankoj, faris grandan gratulindan aferon. Nun la interkonsento estas subskribita, vi devas observi ĝin. Ankaŭ la trupoj de la Popola Liberiga Armeo kaj laborantoj entibetiĝontaj devas ĝin observi kaj sincere helpi la tibetanojn politike, ekonomie kaj kulture. Ĉu ili kondutos tiele? Vi, delegitoj de la Tibeta Registaro, povos rigardi. Rigar-



La ceremonio por subskribi "Interkonsenton pri Paca Liberigo de Tibeto"

du unu, du, tri, kvin, eĉ dek jarojn. Finfine vi klare vidos." Liaj vortoj multe ĝojigis la delegitojn.

"Post la subskribo de la interkonsento oni donis al mi novan taskon — akompani s-ron Zhang Jingwu (Ĝang Ĝing'u), reprezentanton de la Centra Popola Registaro, kaj iujn aliajn por entibetiĝi tra Hindio (tiam la trafiko de landinterno al Tibeto estis maloportuna). Pengcuo Zhaxi daŭrigis sian rememoron: En la komenco de julio, ili atingis Kalimpongon, nordan landliman urbon de Hindio. Tiam, Dalai-lamao telefonis al Kalimpongo por informi al ni, ke li decidis reveni en Lhasa. Laŭ lia propono, s-ro Zhang Jingwu iris de Kalimpongo al Jadong en la sekvanta tago por intervidiĝi kun li. En la intervidiĝo, Zhang transdonis al Dalai-lamao la kopion de la interkonsento kaj leteron de prezidanto Mao al li. Ili reciprokis blankan silkrubandon laŭ la tibeta moro. Dalai-lamao esprimis sian bonvenigon al Zhang. Poste ili ekvojaĝis al Lhasa kaj atingis la lokon la 11-an de aŭgusto.

Pengcuo Zhaxi diris, ke post nelonge, kiam Ngapoi Ngawang Jigme kun siaj kolegoj revenis en Lhasa la 12-an de septembro, la Tibeta Registaro okazigis kunvenon de monaĥaj kaj civilaj oficistoj de Tibeto.

En ĝi Ngapoi Ngawang Jigme kaj aliaj 4 delegitoj detale raportis la pacan intertraktadon kaj enhavon de la interkonsento, petante la ĉeestantojn esprimi siajn opiniojn.

La 24-an de oktobro, Dalai-lamao telegrafis al prezidanto Mao Zedong, ke li konsentis kaj aprobis la interkonsenton. En la telegramo li diris: "Surbaze de amikeco la du delegacioj subskribis 'Interkonsento pri Paca Liberigo de Tibeto' la 23-an de majo 1951, kaj la Tibeta Registaro, tibetaj monaĥoj kaj popoloj unuanime aprobas ĝin. Sub la gvido de prezidanto Mao kaj la Centra Popola Registaro, ili aktive helpas la entibetiĝontajn trupojn de Popola Liberiga Armeo en la batalo por fortigi la nacian defendon, forpeli la imperiismajn fortojn kaj defendi integrecon de la ĉina teritorio."

La 26-an de oktobro, prezidanto Mao Zedong respondis Dalai-lamaon per telegramo: "Mi dankas vin pro via laboro por la Interkonsento pri la Paca Liberigo de Tibeto kaj esprimas al vi mian koran gratulon."

Pengcuo Zhaxi sciigis al mi plue, ke li propraokule vidis, kiel s-ro Zhang Jingwu kaj s-ro Zhang Guohua, la plej supera gvidanto de la entibetiĝintaj trupoj, strikte observis la interkonsenton en la tagoj, kiam li laboris kune kun ili. Li konigis al mi kelkajn bagatelojn:

La 29-an de julio 1951, kiam s-ro Zhang Jingwu akompanata de li atingis Shawugang (Ŝaugang) sur la vojo de Jadong al Lhasa, lokanoj alportis al ili buteron, teon, vinon, ovojn, viandon k.a. S-ro Zhang Jingwu propraokule vidis, kiel mizere vivis la tibeta popolo, li kuntiris la brovojn, dirante: "Mi multe dankas vin pro tiel multe da donacoj, sed mi ne devas akcepti ilin. Ni venis ĉi tien por servi al vi, sed ni ne devas ŝargi vin." Du maljunuloj el ili diris al s-ro Zhang, forte premante liajn manojn: "Ni faras tion el nia pura sincereco, bonvolu akcepti!" S-ro Zhang foje-refoje klarigis kaj fine sukcesis. La donacantoj reportis ĉiujn objektojn. Emociiĝante, la lokanoj multe dankis s-ron Zhang.

Foje, iu soldato vundis tibetanon pro mispafo. Rigardante la malĝojan soldaton, s-ro Zhang Guohua diris nur: "Estus pli bone, se vi trafus min." Iutage survoje s-ro Zhang Guohua vidis, ke iu en han-nacia vesto ĵetis ŝtonojn al sovaĝaj anasoj sur herbejo, s-ro Zhang tuj haltis kaj serioze kritikis lin: "La disciplino malpermesas ĉasi birdojn. Kial vi ne observas ĝin? Diru tion al via estro por ke tiu malliberigu vin por 10 tagoj."

Mi estis mirigita, ke post pli ol 40 jaroj, la maljunulo ankoraŭ klare memoras tiajn bagatelojn, eble li ne forgesos ilin dum la tuta vivo.

Li finis sian rakonton per jenaj vortoj: "Mi forlasis Tibeton kaj nun laboras en la Esplora Centro pri Ĉina Tibetologio en Pekino. La centro estas destinita por servi al Tibeto. En miaj lastaj jaroj, mi donos miajn tutajn sciojn al la tero, pri kiu mi ĉiam zorgas." ■

Katolikismo en Ĉinio

de SHI PING



La katedralo Xishiku en Pekino

S-ro David G. Valecillos, nia peranto en Venezuelo, diris en sia letero: "Ni legis kun grandega intereso la belan artikolon 'la plej alta islama lernejo de Ĉinio' en la 4-a n-ro de EPĈ 1992. Ni petas aliajn artikolojn pri la malsamaj religiaj organizaĵoj en Ĉinio en venontaj numeroj de EPĈ." Nederlanda leganto s-ro N. Kroon diris, ke estante kristano, li interesigas pri kristanismo en Ĉinio. Ankaŭ iuj aliaj legantoj deziras legi artikolojn pri tio. Por kontentigi ilian bezonon ni publikigos artikolojn pri katolikismo kaj protestantismo en Ĉinio en la nuna kaj sekvanta numeroj de nia revuo.

La Red.

KATOLIKISMA HISTORIO EN ĈINIO

Historiaj materialoj konigas, ke jam en la komenco de Tang-dinastio (618-907), filio de kristanismo estis enkondukita en Ĉinion. Imperiestro Li Shimin (627-650 sur trono) afable traktis ĝin. Tiam ĝi estis nomata la religio Ĝing.

Katolikismo ekpredikiĝis en Ĉinio en la 13-a jc. Tiam imperiestro de Yuan-dinastio Kublejo (1260-1264 sur trono) kun egala respekto traktis ĉiujn religiojn. La roma kurio, franca reĝo kaj itala episkopo sendis delegitojn al Ĉinio. Tiam en Ĉinio estis 60 000 katolikoj kaj ĝing-religianoj. Post la falo de Yuan-dinastio preskaŭ komplete malaperis katolikismo en

Ĉinio.

En la 16-a jc. katolikismo denove enkondukigis en Ĉinion, unue en ĝian sudorientan regionon. Tiam la Kompanio de Jesuo sendis misiiston Matteo Ricci al Ĉinio. Dum sia predikado Matteo Ricci disvastigis en Ĉinio ankaŭ eŭropajn sciencojn kaj teknikojn. Li harmonie kombinis la katolikismajn principojn kun konfuceaj doktrinoj kaj prenis tion kiel sian principon de predikado. Dank' al tio, katolikismo multe disvolviĝis sur la ĉina teritorio. En la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644) la Kompanio de Jesuo jam havis 13 preĝejojn kun 130 000 kristanoj en Ĉinio.


En la komencaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911) la eŭropaj misiistoj heredis la ĉefajn trajtojn de la principo de Matteo Ricci. Johann Adam Schall von Bell kaj Ferdinand Verbiest akiris rimarkindan sukceson en verkado de almanako kaj farado de kanonoj. Ili akiris konfidon de imperiestro Ajsingoro Ŝjŭanje (1662-1723 sur trono) pro sia bona laboro en traktato al Rusio. Dank' al la subteno de la kortego, katolikismo multe kreskis en Ĉinio. En 1901 sur la ĉina teritorio troviĝis entute 250 preĝejoj, kun 300 000 katolikoj. Poste la roma kurio malpermesis al ĉinaj katolikoj kulti siajn prapatrojn kaj Konfuceon. Pro tio ĉinaj imperiestroj malpermesis katolikismon en Ĉinio.

KATOLIKISMO EN ĈINIO POST 1840

Post la Opia Milito inter Ĉinio kaj Britio en 1840 Ĉinio fariĝis duonkolonia lando. Britio, Usono, Francio, Germanio, Italio kaj aliaj imperialismaj landoj akiris unu post alia siajn influferojn en Ĉinio. Kaj kristanismo estis uzata kiel rimedo de la okcidentaj koloniistoj en ties agresado. Fremdlandaj misiistoj funkciis kiel helpantoj de la imperiismaj agresantoj, donante al ili informojn kaj proponojn, por ke tiuj kreu pretekston pri sia agresado, dum la imperiismaj agresantoj trudis al la ĉina registaro serion da maljustaj traktatoj kaj donis al la misiistoj tiajn kaj aliajn privilegiojn en la misiado.

Subpremate de la imperiistaj fortoj la registaro de Qing-dinastio praktikis la politikon "helpi katolikismon kaj subpremi la ĉinan popolon", kaŭze de tio, estiĝis multaj konfliktoj, en kiuj eksterlandaj eklezioj kaj la de ili protektataj katolikoj atencis rajtojn de la ĉinaj civitanoj. Tial leviĝis la batalo de la ĉina popolo kontraŭ la eksterlandaj eklezioj. Fine eksplodis en la tuta lando Jihetŭan-movado, kiu kontraŭbatalis la imperiisman agreson kaj eksterlandajn ekleziojn.

En 1922 la roma kurio sendis ital-devenan episkopon kiel sian unuan parokestro-apostolon en Ĉinio. En 1924 okazis la unua ĉina tutlanda konferenco de episkopoj.



Preĝo

Inter la 49 episkopoj, kiuj ĉeestis la konferencon, estis nur du ĉin-devenaj apostoloj. En 1946 la roma kurio ekpraktikis hierarkion kaj starigis 137 parokojn en Ĉinio, kiuj apartenis al 20 diocezoj kun tri milionoj da katolikoj. El la pontifikoj estis nur tri ĉin-devenaj arkiepiskopoj kaj 17 episkopoj, kiuj ĉiuj estis senpotencaj.

Ĉio ĉi montras, ke katolikismo portis koloniismajn trajtojn en la malnova Ĉinio.

KATOLIKISMO POST 1949

En 1949 naskiĝis la Ĉina Popola Respubliko. La roma kurio praktikis kontraŭĉinian politikon. Ĝi malpermesis al la ĉinaj katolikoj subteni la Komunistan Partion de Ĉinio kaj legi ĉian presajon eldonitan post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi arbitre intervenis en la internajn aferojn de Ĉinio, kio vekis publikan indignon ĉe la ĉinaj katolikoj. Novembre de 1950, Wang Liangzuo, pastro en Sichuan-provinco, kune kun 500 katolikoj publikigis manifeston, deklarante, ke ili devas "rompi ĉiajn rilatojn kun imperiistoj kaj fondi novan eklezion surbaze de aŭtonomeco, memprovizo kaj sendependa predikado". La manifesto estis multe aprobata en Ĉinio. La kontraŭimperiisma patriota movado de ĉinaj katolikoj rapide disvolviĝis en la tuta lando. En 1956 fondiĝis 200 katolikaj patriotaj organizaĵoj en Ĉinio, kion tamen malhelpis la roma kurio. Ĝi kal-

umniis, ke tio estas katastrofo por religio kaj pretis severe puni ĉinajn ekleziojn.

En 1957 okazis la Unua Katolika Kongreso de Ĉinio en Pekino. La kongreso decidis oficiale fondi la Ĉinan Katolikisman Patriotan Asocion kaj praktiki la principon "iri la socialisman vojon kaj mem funkciigi la ekleziojn". Post tio en iuj provincoj kaj municipoj establiĝis lokaj patriotaj organizaĵoj.

En 1958 pro bezono de la ĉinaj katolikaj eklezioj, la parokoj Hankou kaj Wuchang (Uĉang) mem elektis du episkopojn laŭ la tradiciaj reguloj kaj raportis tion al la roma kurio, tamen la papo ne nur ne sankciis tion, sed minacis, ke ĝi faros severan punon. Por garantii la rajtojn de la ĉina katolika eklezio, Ĉinio mem okazigis episkopiĝan ceremonion, kiu markis ke Ĉinio faris gravan paŝon al sendependa funkciigo de la eklezioj. En 1962 en Ĉinio la katolikoj mem elektis 50 episkopojn kaj oficiale deklaris "kategorie sin liberigi el la kateno de la roma kurio, ĝisfunde efektiviĝi memstarecon kaj sendependa funkciigon de la eklezioj".

La 10-jara kultura revolucio, komencita en 1966, kaŭzis haŭson al la tuta lando. En la haŭso multaj veteranaj revoluciistoj, registaraj altranguloj, intelektuloj kaj instruistoj, inkl. de religiaj personoj, estis severe atakitaj kaj iuj preĝejoj estis detruitaj.

Post la finiĝo de la kultura re-

volucio, precipe post 1980, la Ĉina Katolikisma Patriota Asocio, la Ligo de la Episkopoj de Ĉinio kaj Ĉina Katolikisma Komitato multe laboris por helpi la registaron en reĝustigo de la maljustaj verdiktoj koncerne la katolikajn funkciulojn kaj religianojn. Septembre de 1992 okazis en Pekino la 5-a Kongreso de Ĉinaj Katolikoj. Post la kongreso mi intervjuis respondeculon de la asocio kaj de li mi informiĝis, ke ĝis nun en la tuta lando 3 900 preĝejoj estis riparitaj kaj denove malfermitaj. Oni presis pli ol 600 000 ekzemplerojn da Biblio kaj aliajn katolikismajn legaĵojn. La revuo "Ĉina Katolikismo" estas destinita por ekspliki la Biblion, prediki la ceremonion, propagandi patriotismon kaj eklezion kaj interŝanĝi spertojn de diverslokaj preĝejoj. Nun ĉiufoje estas eldonitaj 10 000 ekzempleroj.

Nun en Ĉinio troviĝas 12 seminarioj funkciigataj de la ĉina katolika eklezio. En Pekino estas la landskala Ĉina Katolikisma Teologia-filozofia Seminario. Tie en 6 jaroj la lernantoj studas teologion, filozofion, kulturajn sciojn kaj fremdlandajn lingvojn. Kaj la aliaj 11 seminarioj estas lokaj. Nun en la tuta lando lernas 740 seminarianoj, elektitaj el katolikaj abiturientoj de diversaj diocezoj post fizika ekzameno kaj ekzameno pri kulturaj scioj. Fininte la studon en la seminario, ili povas promociiĝi al sacerdoteco post ekspertizo de la religianoj kaj aprobo de la koncerna episkopo. Kompreneble, antaŭ tio ili devas prezenti petskribon. Nun estas 420 sacerdotoj, kiuj diplomitiĝis el la seminario. En Ĉinio la katolika eklezio funkciigas 37 monaĥinejojn. Komplete rompinte la rilatojn kun riĉeco, decidinte dumvivan fraŭlinecon kaj obeante la gvidantojn, la fraŭlinoj povas fariĝi monaĥinoj post 3-jara studo.

En Ĉinio nun estas 112 diocezoj, kie laboras 68 episkopoj, kiuj plejparte komencis labori post 1958, 900 sacerdotoj kaj 1 200

(Daŭrigo sur p. 50)

En la hejmloko de ruĝvertaj grupoj

Teksto de CAO WEI

Fotoj de YAN JIN

AŬTUNE de 1992 mi venis al nordorienta Ĉinio por intervjuo. Tie mi vizitis 4 guberniojn kaj urbojn de Baicheng, Jilin(Ĝjilin)-provinco. Tie mi restis mallonge kaj rigardis malmulte, tamen mi vidis la realecon de Ĉinio.

AKVOMELONOJ DE TAONAN

Taonan estis la unua stacio de mia intervjuo.

Kiel malnova urbo ĝi situas oriente sur Horqin (Horĉin)-stepo. La urbo estas negranda, ĝiaj stratoj neordaj, sed ĝia komercado prospera. La akvomelono de Taonan, granda kaj dolĉa, renomiĝis en la provincoj Heilongjiang(Hejlongĝjang), Jilin kaj Liaoning de nordorienta Ĉinio jam en la 40-aj jaroj. En kulturado de la akvomelono oni uzas bestan sterkon anstataŭ kemisterkon kaj insekticidon. Tie la akvomelono estas sukeroriĉa pro longa taglumado kaj grundo riĉa je kalia sterko.

Heishui-urbeto distingiĝas per sia granda produkto kvanto de akvomelonoj en Taonan. En akompano de la urbestro mi venis al la pogranda bazaro de akvomelonoj. Mi vidis, ke en la 2-3-hektara bazaro estas multaj porakvomelonaĵveturiloj venintaj el diversaj vilaĝoj. Mi demandis iun maljunan vendanton: "Kia estas la rikolto ĉi-jara?" Li diris al mi, ke la ĉi-jara rikolto estas la plej bona en la lastaj jaroj, tamen iliaj akvomelonoj estas neforvendebaj pro multeco. Li prenis akvomelonon ĉ. 10 kg pezan kaj donis ĝin al mi. Mi demandis la urbestron: "Kial vi ne transportas la melonojn al Pekino? Nun en Pekino la akvomelonoj iom post iom malmultiĝas. La akvomelonoj, nun vendataj en la pekina merkato, estas transportitaj el Xinjiang(Ŝingĝjang)." Li respondis: "La akvomelonoj de Heishui kaj tiuj de Xinjiang rikoltiĝas preskaŭ en la sama tempo, nur ni ne bone rekomendas niajn akvomelonojn al aliaj lokoj. Jen, nia urbo Baicheng aranĝas akvomelona foiron tiucele."

Vespere Taonan inaŭguris sian akvomelona foiron kaj invitis diverslokajn gastojn al la komerca intertraktado. Videble, la nekonata Taonan jam komencis kontakti kun la ekstera mondo.


DU ĈEFAJ INDUSTRIAJ ENTREPRENOJ

La Unua Farmacia Fabriko de Taonan, profitodona, havas maksimume 600 laboristojn kaj oficis-

tojn. Ĝia profito kreskas je miliono da juanoj ĉiujare. Ĝi havis 8 milionojn da juanoj da profito en 1992. Ĝi kune kun la Ĉina Ĉin-medicina Instituto elfaris puran ĉinan medikamenton kontraŭ kardiovaskula malsano — Xinnaoshutong(Ŝinnaŭŝutong), kies kuraca efiko estas rimarkinda sen malutilo. La medikamento havas grandan debiton en kaj ekster la lando. La fabrikestro fiere diris al mi, ke ĝia stoko estas elĉerpita. Mi malsukcesis viziti la laborejon, ĉar tie oni portempe ĉesis produkti pro instalado de nova produktolinio.

Male, la Dua Lanteksa Fabriko de Taonan sin trovas en malfacilo. Mi renkontis ĝian estron, kiu kun malgaja mieno diris al mi, ke la fabriko kun 2 500 laboristoj profitis nur 5 000 juanojn en la unuaj ok monatoj de 1992.

Akvomelonoj de Taonan



La fabriko komencis produktadon en 1987. En 1989 ĝi profitis 1.08 milionojn da juanoj, produktis 320 erojn de 120 specoj jare. Ĝiaj produktaĵoj vendiĝis en multaj provincoj kaj urboj de la lando. Tamen en la lastaj jaroj pro diversaj kaŭzoj la fabriko ne povis repreni 37 milionojn da juanoj, kiujn la vendejoj ŝuldis al ĝi. Por altigi la kvaliton de la varoj, ĝi sin preparas por kunlabori kun Hongkong-aj komercistoj, tamen la kredito de 2 milionoj da juanoj ankoraŭ ne estas trovita.

En la eksponejo de la fabriko mi vidis ĝian originalan lana-dilonan ŝtofon, acidimunan, akvorezistan kaj aerotralasan. Mi informiĝis de la fabrikestro, ke ĝi ne trovis merkaton. Mi opinias, ke ĝi estas bona materialo por fari mantelon, kaj proponis fari el ĝi vestojn. La fabrikestro diris, ke ili provos. Videble, la fabriko ankoraŭ ne solvis la malfacilon de vendo kaj ĉenŝuldo.

AL LA NATURO

En Baicheng sin trovas la Xianghai(Ŝjanghaj)-a Naturparko, kiu situas en vasta kaj maldense loĝata Tongyu-gubernio. Ni veturis al ĝi. Survoje mi vidis antikvajn ulmojn kreskantajn inter sovaĝaj herbaroj duonhome altaj. La blua ĉielo kaj arboj kun abundaj branĉoj multe sentigis la dezertecon de la vasta stepo. En la naturparko kun areo de 1 054 kvadrataj kilometroj vivas 245 specioj da raraj birdoj. El la 1 500 ruĝvertaj grupoj vivantaj en la mondo 60 ĉiam vivas kaj generas tie.

Post ripozo en la tagmezo mi vizitis la naturparkon en akompano de ĉiĉerono. Montrante la senliman akvon, li diris al mi: "Jen Xianghai-akvokonservejo. La fiŝoj, kiujn ni manĝis en la tagmanĝo, ja estis kaptitaj en ĝi. Tie abundas akvo kaj herboj nepoluitaj. Printempe oni enmetas alvusojn, vintre tiuj kreskas ĝis 1-1.5 kg. Oni kaptis per reto foje eĉ pli ol 250 000 kg da fiŝoj."


Krom la vasta akvo, tie etendiĝas ankaŭ senlima frugmitejo. Birdoj libere flugas inter la blua akvo kaj verdaj frugmitoj.

Ĉe la frugmitejo konstruiĝis kelkaj bredejoj por la ruĝvertaj grupoj. Tiuj bredataj ruĝvertaj grupoj estas tre intimaj al homoj. Bredisto konigis, ke iatempe ili eĉ entrudiĝis en la kortojn de vilaĝanoj por serĉi manĝaĵon. La vilaĝanoj bonkore forpelis ilin ĉiam, post kiam ili sate manĝis.

Ni pasloĝis en vilaĝeto en la naturparko. La vilaĝeto estas akceptejo por rigardantoj de grupoj. Ĝi akceptis fakulojn kaj erudiciulojn el dekelkaj landoj, kiaj Britio, Francio, Usono kaj Japanio.

HAVENO DA'AN

Nenjiang(Nenĝjang)-rivero en nordorienta Ĉinio kiel jada rubando fluas en la regionon Baicheng. Antaŭ ol enflui en la Duan Songhua-riveron, ĝi formis la naturan havenon Da'an, iaman naturan



En la Baicheng-a Ĝenerala Fabriko de Elektraĵoj

kajon formiĝintan el leŭsa rompiĝinta krutaĵo je 10 m pli alta ol la riversurfaco. Ĉe la haveno estas fera ponto super la rivero. Ni informiĝis de ŝipano, ke fervojo sur ĝi kondukas al Daqing (Daĉing), petrola bazo de Ĉinio.

Da'an-haveno ekkonstruiĝis en 1957. Nun ĝi jam fariĝis ampleksa haveno povanta el- kaj enŝipigi karbon, grenon, lignon k.a. Ĝia jara el- kaj enŝipiga kvanto estas pli ol 450 000 tunoj. En 1990 ĝi fariĝis malfermita haveno. Ĝi povas fari rektan komercon kun eksterlando. Ekirinte de tie, oni povas veni al la rusa Habarovska haveno tra la riveroj Songhua kaj Heilongjiang kaj fine al la Japana Maro.

Sur iu kargoŝipo mi renkontis ŝipanon, kiu laboris tie pli ol 40 jarojn. Liaj travivaĵoj ja montras la ŝanĝigon de Da'an-haveno. Komence li veturigis lignan pramon, poste li transportis karbon de la malsupra baseno per motora ŝipo. Lastatempe informiĝinte pri ebleco negoci kun rusoj, li tre ĝojiĝis. En la 50-aj jaroj li jam transportis al Sovetunio lokajn grenon, fiŝojn kaj ŝtofojn, la negoco estis prospera. Videble, nun venas al li denove bonŝanco por riĉiĝi.

Mi ascendis turon ĉe la haveno kaj tie mi havis panoraman vidon al la haveno. Mi vidis, ke en la staplo amasiĝas ligno kaj transportotaj ĉiutagaj necesajoj. Ĉe borde kuŝas ŝipoj plenaj de karbo. La tuta haveno estas movoplana kaj bonorda. La torenta Nenjiang-rivero kunligas Da'an kun la ekstera mondo.


BAICHENG, ĈEFURBO DE LA REGIONO

Baicheng, kie funkcias la regiona administracio, estas urbo kun plej bone disvolvita ekonomio en la regiono. Tie la stratoj estas larĝaj kaj rektaj. La komerca kvartalo estas movoplana. Antaŭ ĉiuj restoracioj pendas elpendaĵoj, originalaj en nordorienta Ĉinio. Rigardate de malproksime, ili flirtas en vento, gustoplene impresante.



Da'an-haveno

Ulmoj sur herbejo



La peza industrio estas la ĉefa en la ekonomio en la regiono Baicheng. La Baicheng-a Ĝenerala Fabriko de Elektraj Dratoj por Aŭtoj estas la plej granda el la samspecaj fabrikoj en la lando. La fabriko povas reprezenti la teknikan superecon de la regiono. Nun ĝi produktas elektrajn dratojn por altklasaj aŭtomobiloj kune faritaj de Ĉinio kaj eksterlando, kiaj Audi, Golf, Jetta kaj Citroen.

En la fabriko mi vidis plej avangardajn produktajn ekipaĵojn kaj postigintan manlaboron. Iu drat-tranĉa kaj sentubiga maŝino regata per komputilo profunde impresis min. Ĝi senerare traĉas dratojn, forigas la finon de drattuboj kaj juntas dratojn. En alia laborejo mi vidis, ke plenumado de tiu procezo bezonas tri laboristojn. Mi demandis iun laboristi-

non, kiom da dratoj ŝi tranĉas unutage. Ŝi respondis, ke pli ol 3 000. Rigardante ŝian laboron, mi sentis min kvazaŭ samtempe en du malsamaj epokoj.

La fabrikestro kondukis min al vasta domo, kie ĉ. 30 junuloj en du vicoj tre atente desegnas ion ĉe tablo. La fabrikestro diris: "Tio estas laborejo produktanta elektre movatajn fenestrajn kuplostangojn de Audi. Ili ĉiuj estas diplomitoj ĵus venintaj el teknika lernejo. Ilia unua leciono estas fari rician dispozicion por sia plej moderna laborejo."

Mia vizito en Baicheng finiĝis, tamen la honesteco de nordorientanoj gravuriĝis en mia memoro. Iuj el ili aspektas zorgoplenaj, sed multaj aliaj estas gajaj. ■



Ruĝvertaj grupoj Foto de GAO YUTIAN

KURANTAJ AFEROJ

EKONOMIO

● Post kiam marbordaj kaj limregionaj urboj estis malfermitaj al aliaj landoj, Ĉinio decidis plie malfermi la urbojn Chongqing(Ĉongĉing), Yueyang(Juejang), Wuhan(Uhan), Jiujiang (Ĝiŭĝjang) kaj Wuhu ĉe la bordoj de Yangzi(Jangzi)-rivero; la provincajn ĉefurbojn Harbin, Changchun, Hohhot, Shijiazhuang (Ŝiĝjaĝŭang), Taiyuan, Changsha, Hefei, Nanchang, Zhengzhou, Chengdu, Guiyang, Xi'an (Ŝji'an), Lanzhou, Xining (Ŝjining) kaj Yinchuan(Jinĉuan). Oni praktikas al ili la politikojn similajn al tiuj por malfermitaj marbordaj urboj. Nun Ĉinio jam faris novan aranĝon de ĉiufanka malfermo al la eksterlando.

● Antaŭ nelonge okazis en Xi'an la Internacia Kunveno pri Ekonomia kaj Teknika Kunlaboro unuafoje kunvokita kune de Gansu-provinco, Qinghai(Ĉinghaj)-provinco, Shaanxi (Ŝensji)-provinco, la Ningxia-a Hui-nacia Aŭtonoma Regiono, Xinjiang(Ŝingĝang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Xi'an kaj la Produkta kaj Konstrua Regimento de Xinjiang kaj la Industrio-disvolva Organizo de UN. Ĝin partoprenis pli ol 1 000 komercistoj el 42 landoj kaj regionoj, kiaj Japanio, Koreio, Francio, Germanio, Usono, Kanado, Brazilo, Sud-Afriko, Hongkongo kaj Taiwan(Taj'ŭan).

En la kunveno diversaj provincoj, regionoj kaj urboj de nordokcidenta Ĉinio kaj la Xinjiang-a Produkta kaj Konstrua Regimento subskribis 511 kontraktojn pri utiligo de fremdaj kapitaloj, kun totala investo de 1 474.85 milionoj da usonaj dolaroj kaj alilanda rekta investo de 827.71 milionoj da usonaj dolaroj; 107 kontraktojn pri teknika importado kun valuto de 183.24 milionoj da usonaj dolaroj; kaj 58 kontraktojn pri teknika eksporto kun valuto de 25.13 milionoj da usonaj dolaroj. Estis atingitaj 193.22 milionoj da usonaj dolaroj en la import-eksporta negoco. La sukceso de tiu ĉi kunveno plene montris, ke nordokcidenta Ĉinio jam partoprenas en internacia ekonomia kaj teknika kunlaboro, kaj faris paŝon antaŭen en pordom-alfermo kiel landinterna regiono.

● La Kvara Internacia Ekspozicio de Min-ekspluataj Ekipaĵoj kaj Teknikoj, antaŭ nelonge okazigita en Pekino, anoncis, ke la "plano de minserĉa tekniko" de Ĉinio iras glate. Kun 1 440 novaj minejoj, Ĉinio fariĝis la tria lando

de mineraloj en la mondo kaj estas fame konata pro siaj multspecaj minerejoj kaj riĉaj rezervokvantoj. Samtempe formiĝis serio da produkta sistemo de prospektado, scienc-esplorado, ekspluatado kaj utiligado. Ĝi servas kiel grava industrio de la ĉina nacia ekonomio.

● La urbo Leling ĉe la limo inter Hebei- kaj Shandong-provincoj estas la hejmloko de famaj ĉinaj jujuboj. Tie kreskas 8 milionoj da jujubarboj. De 1989, la urbo, utiligante la riĉfonton de malgrandaj jujuboj kaj geografian situon de la historia komerca centro ĉe la limo inter Hebei-kaj Shandong-provincoj, sukcese importis fremdan kapitalon kaj disvolvis ekonomion kun jujuboj kiel peranto. En la unuaj 8 monatoj de 1992 ĝi importis 12 milionojn da usonaj dolaroj, kaj formiĝis 5 eksportaj kaj valut-profitaj entreprenoj de fruktoj, mebloj, metaloj, manĝaĵoj kaj pecoj de aŭtoj kun jujuboj kaj ties prilaboraj produktaĵoj kiel la ĉefaj. La jara valut-profito kreskis de 8 milionoj da usonaj dolaroj en 1988 al 50 milionoj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO


● Subtenate de la Ĉina Naturscienca Fonduso la projekto "mikro-strukturo kaj kvalito de subtila ceramika konsisto" estis ekspertiĝita de la ŝtato kaj petis patenton.

Subtila ceramikaĵo estas antaŭpozicia temo en la nuna internacio. Ĝi, varmego-eltena kaj altforteca, estas aplikata en komputilo, fotokomunikado kaj multaj kampoj de novaj teknikoj, ekz., materialo de silicia nitrido povas esti utiligata kiel ŝlosilaj pecoj de aŭtoj, aeroplanoj kaj motoroj, kaj tiel ilia funkcio multe pligrandiĝis.

● Ĉinaj sciencistoj pri nukleo, post peniga esplorado, unuafoje en la mondo eltrovis la nukleinan platenon 202. Ĝi liveros gravajn bazojn por ekzamenado de la antaŭdirita teorio pri nuklea strukturo kaj eltrovo de novaj fenomenoj.

TURISMO

● Lugou-ponto de Pekino, longa je 266.5m kaj larĝa je 9.5m, estis konstruita el blanka marmoro en 1192. Ĝi fariĝis unu el la pekinaj vidindaĵoj pro 498 ŝtonaj leonoj, malsamgrandaj kaj diverspozaj, en 280 grupoj sur siaj balustradoj. Antaŭ nelonge ĝi pasigis sian 800-an datrevenon de la naskiĝo kaj estas protektata kiel valora historia objekto, ke estas malpermesate al veturiloj trapasi sur ĝi.



Membroj de la Orienta Ensemblo en prezentado

ARTO

● La Orienta Ensemblo estis fondita en 1962 laŭ la propono de ĉefministro Zhou Enlai de Ĉinio. En la 30 jaroj ĝi ne nur verkis kaj prezentis grandan nombron da ĉinaj popolaj dancoj kaj kantoj, sed ankaŭ prezentis pli ol 300 alilandajn dancojn, mil alilandajn kantojn kaj kompoziciojn kun aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popolaj kantoj kaj dancoj kiel la ĉefaj. Kiel amikeca sendito, ĝi vizitis pli ol 60 landojn kaj regionojn por fari vizitadon, prezentadon kaj interŝanĝon de artoj. Okaze de la 30-a datreveno de sia fondiĝo, la Orienta Ensemblo aranĝis vesperon titolitan per "Transmaraj moroj". En ĝi oni prezentis "Jupan Dancon" kun densa loka etoso, liberstilan "Apogbastonan Dancon", elegantan "Matenan Kompozicion" kaj patosplenan "Impreson pri Afriko", kiuj estis varme bonvenigataj de la spektantaro.

● Dekoj da manekenoj lastatempe prezentis en la Lhasa-a teatro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kio faris sensacion.

En 1991, en la 40-a datreveno de la paca liberiĝo de Tibeto la unuaj postlaboraj manekenoj aperis en Lhasa. Nun la tibetaj Feria Hotelo, Dancejo de Neĝa Urbo, Elektra Dancejo k.a. fondis sian

postlaboran trupon de manekenoj. Krom fari prezentadon, ili ankaŭ projektas fasonojn.

AMIKECO


● Direktoro de la Japana Internacia Novaĝ-agentejo s-ro Huang Yuanzhu fervore kontribuis al la eduka afero de la ĉina kamparo. Lastatempe li donacis 5 milionojn da enoj por konstrui ĝardenstilan lernejon kune kun la magistrato de Renqiu (Ĵenĉiŭ) de Hebeiprovinco. Kun kompletigitaj instruaj ekipaĵoj ĝi povas enteni 2 000 lernantojn. Honore

al la fano de s-ro Huang, la lernejo estas nomata "Yuanzhu-Lernejo". Samtempe kun tio, s-ro Huang donacis monon al Yan'an de Shaanxi (Ŝensĵi)-provinco por konstrui mezlernejon. En 1991 Ĉinion atakis inundo, s-ro Huang donis monhelpon, kio montris lian profundan amikecon al la ĉina popolo.

MALOFTAĴO

● En Fusong-gubernio de Jilin-provinco, la hejmloko de ginsengoj de Ĉinio, oni trovis lastatempe en la primitiva arbaro de Changbaimontaro sovaĝan ginsengon 340g pezan, kiu kreskis jam pli ol 500 jarojn. La ginsengo havas duoblan korpon, kies maldekstra parto estas virseksa kaj la dekstra insekse, laŭ popoldiro, ĝi estas "geedza ginsengo". Tio neniam antaŭe okazis en la mondo.

Sovaĝa ginsengo trovita en Fusong-gubernio



Krucvortenigmo

Rumana leganto Suzanna Barabás sendis al ni krucvortenigmon ellaboritan de ŝi mem. Jen la enigmo, kaj la solvo troveblas en la venonta numero.

Ĉinaj antikvaj inventaĵoj, nome porcelano, pulvo, kompaso, papero kaj silko, troviĝas ĉe la 1-a, 10-a, 32-a linioj horizontalaj kaj la 1-a kaj 20-a vertikalaj. (R signifas vortradikon)

Horizontale:

8. Antaŭ la naskiĝo de Kristo. 9. En kontraŭa direkto. 13. ...Stewart (n. 1945) — angla kantisto kaj komponisto. 14. Komplete plenumi. 16. Prononcata konsonanto. 17. Sufikso, esprimanta malaltigon, malfortigon de l' grado. 18. Persona pronomo. 21. Sufikso, kiu prezentas parton de la nombro. 23. Kredi ion vera.

(Daŭrigo de p. 43)

monaĥinoj. Nun la katolikaro nombras 3.8 milionojn en la tuta lando.

La ĉina katolika eklezio proponas kombini servon al la popolo kun respekto al la Dio, aktive entreprenas la sociajn bonstatigajn aferojn, kiel funkciigo de postlaboraj lernejoj, konvaleskejoj, maljunulejoj, infanĝardenoj kaj farado de beneficoj. En Ĉinio 960 katolikoj funkcias kiel membroj aŭ konstantaj komitatanoj de diversnivelaĵoj popolaj kongresoj kaj membroj aŭ vicprezidantoj de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco. Pli ol 3 000 religianoj estas titolitaj kiel labormodeloj aŭ antaŭirantoj de provincoj kaj municipoj.

26. En tiu ĉi tempo. 28. Tablo por metia laboro (R). 29. Nigra, malmola, peza ligno (R). 31. Meze de dika! 33. Simboloj de sulfuro kaj oksigeno.

Vertikale:

2. Organo de la vidsento (R). 3. Libera lando, regno, regata de la reprezentantoj de la popolo. 4. Loro! 5. Gaso, kiun ni spiras (R). 6. Kemia elemento, senodora kaj senkolora gaso, uzata por lumreklamiloj (R). 7. Ĝi kreigiĝas sur la supraĵo de maro. 11. Parto de del-feno. 12. Sama kiel 21. horizontale. 15. Faras tiel, kiel faras alia persono. 19. Virina. 22. Amaso da densa akvovaporo. 24. Poso! 25. Birdo el la vico de l' longkruraj (R). 26. Konjunkcio kun la senco: ankaŭ ne. 27. Vorto, uzata por distingi objekton aŭ personon (R). 30. Simboloj de azoto kaj fosforo.

La ĉina katolika eklezio efektivas amikecan kontaktigon kun aliaj landoj surbaze de reciproka egaleco kaj reciproka respekto. De 1987 ĝi akceptis pli ol 10 000 vizitantojn el 90 landoj kaj regionoj, inter kiuj estis ŝtatestroj, arkiepiskopoj, kardinaloj kaj teologoj. Invitite, ĉinaj katolikoj vizitis Kanadon, Usonon, Belgion, Francion, Germanion, Svislandon, Aŭstrion, Hungarion, Japanion, Filipinojn, Koreion, Honkongon, Aŭmen kaj aliajn landojn kaj regionojn. Ili ĉeestis ankaŭ iujn internaciajn kunvenojn.

Kiam mi demandis respondecon de la ĉina katolika eklezio pri la interrilatoj inter la eklezio kaj roma kurio kaj pri la tiel nomata

1	2		3		4	5	6	7
8					9			
10		11		12		13		
14					15		16	
		17			18	19		20
21	22		23	24				25
26		27		28				
29			30					31
32								33

Solvo por "Konkurso de pokalo Aeolus"

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
B	B	C	A	C	C	A	A	B	C

Solvo por "Krucenigmo de la lasta numero de 1992"

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	a	t	r	i	b	u	t	o	j	s
2	g	r	a	t	u	l	o	n		e
3	r	o	m	a	n	a	r	t	a	n
4	a			l	k		t	a	k	t
5				h	a	r	a	k	i	r
6	ĉ	i	u		e	i	a	n	i	s
7	a	g	r	a		o	s		d	
8	s	o	l	v	i	n	t	o		e
9	e	n	u	i	s		e	r	o	j
10	j		s	a	t	e	l	i	t	o

persekuto al ĉinaj katolikoj, li respondis, ke Vatikano ne agnoskis la Ĉinan Popolan Respublikon kun 1.1 miliardoj da loĝantoj kaj tenas la t.n. diplomaciajn rilatojn kun Taiwan(Taj'ŭan). Tion la ĉina popolo ne toleras. Tion ne toleras ankaŭ la ĉinaj katolikoj. En la ĉina konstitucio legiĝas, ke la ĉina civitano havas la liberon de kredo je religio kaj la ŝtato protektas normalan religian aktivadon. La atingoj akiritaj de la ĉina katolikismo jam konfirmis tion. Aliflanke, la ŝtato punas ĉiujn, kiuj faris kontraŭlegan krimadon, inkluzive katolikojn. Estas sendube malĝuste diri, ke la ĉina registaro persekutas katolikojn, surbaze de tio, ke inter la punitaj krimuloj estas katolikoj.

Sur la Riverfonta Vojo

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

NI suriris la Riverfontan Vojon, la plej dangan sur la antikva vojo al Tibeto.

Dekoj da milionoj da ĉinoj vivis kaj generis ĉe la bordo de la Flava Rivero kaj estis influataj de ĝia civilizacio dum 5 000 jaroj. Tamen, kiu vidis la honestan kaj naivan Flavan Riveron en la lulilo? Kiu aŭdis la unuan gutadon de la Flava Rivero, starante ĉe ĝia vera fonto? Tiuj, kiuj spertis tian imponaĵon, estis malmultaj kaj registritaj en historia libro. Ni havis la bonŝancon surpaŝi tiun senliman dezertan teron, kaj pro tio ekbrilis nia vivo.

LA "RIVERFONTA VOJO"

Antaŭe mi opiniis, ke la fonto

de la Flava Rivero similas nur al punkto aŭ cirklo. Fakte ne. Ĝi estas granda kunfluejo de multaj fluoj. La fonto komenciĝas okcidente de Yueguzonglie-baseno kaj finiĝas oriente ĉe la lagoj Zhaling kaj Eling.


La fonto de la Flava Rivero situas sur alta altitudo, kovrita per neĝo kaj herbo kaj punktita de nigraj tendoj. Tie la vetero estas frostakaj varia. La loko estas maldense loĝata. Ne vidiĝas loĝantoj en interspaco de dekoj aŭ eĉ centoj da km. Kiam mi hazarde renkontiĝis kun tibet-naciecaj paŝtistoj, rigardante ilin kaj ilian grandan gregon da neĝblankaj ŝafoj, mi dubis: "De kie ili venis? Kie estas ilia hejmvilaĝo?" Kiam mi faris tiun demandon al mia vojevadanto, li

ridetis kompreneble: "Ili ĉiuj estas indigenoj sur tiu tero." Mi pensis plue, ĉu ankaŭ mi povus vivi kaj kreski tie. En la longa vojaĝo laŭ la antikva vojo mi sentis, ke la malfavora altebenaĵa medio ĉiam provas nin. Mi ege admiris, ke preskaŭ ĉiuj tibet-naciecaj paŝtistoj havas fortikan korpon, brunan kaj brilan vizaĝon, firmajn kaj blankajn dentojn. Tio rezultas ne nur el ilia ĉefa manĝaĵo el viando kaj lakto, riĉaj je kalcio kaj proteino, sed ankaŭ el tio, ke ili senescepte havas en si bonrasan genon.

Historia libro diras, ke la plej fruaj loĝantoj ĉe la fonto de la Flava Rivero estis la antikvaj ĉjangoj kaj supioj. Poste la ĉjangoj apartenis al Tubo-regno kaj la loko, kie vivis supioj, estis aneksita de ĝi. De tiam la tubanoj vivis ĉe la fonto de la Flava Rivero.

En la historia libro legiĝas la noto pri la "fontovojo de la Flava Rivero": Kiam princinoj Wencheng kaj Jincheng venis al Tubo-regno por edziniĝo, ili postlasis neforviŝeblajn spurojn sur la vojo. Liu Yuanding, sendito de Tang-dinastio (618-907), venis al Lusuo (Lhasa) por la 8-a alianciĝo inter Tang-dinastio kaj Tubo-regno en 822; multaj senditoj, monaĥoj kaj metiistoj de Tang-dinastio kaj Tubo-regno vojaĝis sur la vojo; senĉese venis homoj al la riverfonto por serĉi oron kaj ercojn. Post longa tempo ĉe la riverfonto formiĝis vojo kiel grava pasejo al Tibeto de la landinterno en la antikveco.

Skemo de la antikva vojo Tangbo



Irante laŭ la vojo okcidenten, unue ni eniris la marĉan landon Xingxiuhai (Ŝingsiŭhaj), poste atingis la basenon Yueguzonglie. Pli poste, ni daŭre iris kontraŭ la fluo de Maqu-rivero rekte al Kari-rivero, la fonto de la Flava Rivero.

ĈARMA XINGXIUHAI

Ni, kvaropo, inkluzive de la vojqvidanto, luis 6 ĉevalojn kaj rajdis al Xingxiuhai (signifanta ĉinlingve maron de steloj). Post ĉirkaŭ dutaga veturado ni venis al la meza parto de la baseno Xingxiuhai.

La baseno en formo de kalabaso estas ĉirkaŭita de neĝkovritaj montoj pli ol 5 000 metrojn super la marnivelo. Ĉe la montpiedo kanaleto sur la vasta herbejo interligas lagetojn, kiuj punktas grandan marĉan herbejon.

Ni kampadis en Zajiashan-monto. Tagmeze sur la monto ni vidis la herbejojn miksitaj kun lagetoj en la spaco de ĉ. 50 km. Ne eblas distingi akvosurfacon disde herbaro. Jen nuboj kovris la sunon. Momente inter la lagetoj kiel steloj en nokto, reflektiĝis sennombraj brilantaj lummakuloj. Jen vilaĝo kaj hejmloko de steloj!

Klaraj lagetoj reflektis la bluan ĉielon, blankajn nubojn kaj montpintojn, kaj de tempo al tempo levigis ondetoj faritaj de fiŝoj. Laŭdire, la kvanto de gimnokarpoj

(*Gymnocypris przewalskii*) en Xingxiuhai ne estas malpli granda ol tiu en la lagoj Qinghai, Zhaling kaj Eling. Tio kaŭziĝis eble pro tio, ke la loko estas vasta kaj maldense loĝata kaj malofte vizitata, aŭ tibet-nacianoj kultas fiŝojn kiel dion, tiel ke la fiŝoj pli kaj pli multiĝas.

La tieaj ŝafoj kun la nomo Zajiashan estas grandaj kaj grasaj. Ilia lano, glata kaj elasta, estas materialo por teksti altklasan tapiŝon.

La aserto, ke la Flava Rivero fontas el Xingxiuhai, jam cirkulis de longe en Ĉinio, kaj estis korektita en 1952 en la unua esplorado pri la fonto de la Flava Rivero post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Tamen Xingxiuhai ne perdis sian brilon, kaj ĝia pejzaĝo, varia kaj kurioza, estas ankoraŭ alloga kiel antaŭe.

EN LA BASENO YUEGUZONGLIE

La nomita baseno situas okcidente de Xingxiuhai. Fakte la fonto de la Flava Rivero estis granda baseno de oriento al okcidento. Poste, pro terkrusta movado levigis monteto meze en la baseno, kiu poste estis tranĉita de fluo kaj formiĝis Mangga-valo dividinta la basenon en du partojn, t.e., oriento de ĝi kuŝas la lagoj Zhaling, Eling kaj Xingxiuhai, okcidente sterniĝas la baseno Yueguzonglie.

La topografio de Yueguzonglie

estas preskaŭ sama kiel tiu de Xingxiuhai. Tie vidiĝas multaj termasoj grandaj kaj malgrandaj. Sur ili kreskas malaltaj herboj kiel turpintoj ĉirkaŭitaj de akvo, sennombraj tiaj pintoj formis altebenaĵan marĉan herbejon.

Trairinte malebenan vojon, ni rimarkis 9 montetojn el kalkoŝtono starantajn en unu vico. La vojqvidanto konigis al ni, ke tio estas marko de la baseno Yueguzonglie.


La monto Yaheladaheze alte staras, ĉe ĝia piedo murmuris la riveroj Zhaqu, Yueguzonglie kaj Kari. En 1952 sciencistoj esploris la Flavan Riveron kaj konfirmis, ke la ĝusta fonto de la Flava Rivero estas la rivero Yueguzonglie, alinome Maqu. Ĝi fontas el la monto Yaheladaheze. Maqu jam formiĝis en riveron en la baseno Yueguzonglie. Ni veturis laŭflue kaj venis al la fonto de Maqu. Tie etendiĝas marĉo.

En 1978 oni komencis la duan esploron al la Flava Rivero post la fondiĝo de la nova Ĉinio kaj ekhavis novan konon pri la fonto de la Flava Rivero, opiniante, ke la ĝusta fonto de la rivero devas esti Kari. Laŭ la principo "riverfonto devas esti longa", Kari estas pli longa ol Yueguzonglie je 25 km, la baseno pli granda je 752 kvadrataj km kaj la flukvanto pli granda je 3.8 kubmetroj sekunde. Gezigejamento norde de la montaro Bayan Har estas la lulilo de la Flava Rivero. Ni ne intencis ekzameni la fonton de la Flava Rivero, tamen ni entibetiĝis, ĝuste trairinte la riveron Kari kaj transpasinte la monton Tanggula.

Ni restis en Yueguzonglie du tagojn. Ni starigis nian tendon apud tiu de la familio de maljunulo Nianza, ununura sur la marĉa herbejo. Vesperiĝis. Ni ĉiuj sidis sur neĝo. Ni starigis fornon el tri ŝtonpecoj, metis sur ĝin kaldronon por kuiri viandon. La maljunulo senĉese blovis en la fornon. La blovilo estis farita el kompleta ŝaf-felo kun hararo. La felo de la membroj estis firme ligitaj kaj al tiu de la kolo fiksita metala tubeto

Sur oro-serĉejo





Paŝtistaj familioj ĉe la fonto

kun la aperturo kontraŭ la forno. Li, premante la ventron de la ŝafelo per unu mano kaj tenante ĝian dorson per la alia, senĉese blovis. Ni scivoleme konkuris en blovado, sed vane. Ni pasigis interesan vesperon ĉe la fonto.

LA FLAVA RIVERO EN VINDO

Suden irinte de la kunfluejo de Yueguzonglie kaj Kari, ni eniris en la rivervalon Kari. Gezigeyamonto, la patrino de la Flava Rivero, iom post iom vidigis sian grandiozan konturon. Ni peneme surgrimpis malgrandan montpinton. Rigardante ĉirkaŭen, ni sentis la sanktecon kaj elegantecon de "honesteco kaj senpartieco". Ni ĝoje vidis, ke la fontriveroj de

la Flava Rivero Yueguzonglie, Kari kaj Zhaqu malrapide elfluas de oriente. Tongtian-rivero, la supra baseno de Yangzi-rivero, iras preter la montdorso. Ili distancas je malpli ol cent m. Tie la antikva vojo al Tibeto, Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero kune etendiĝas, kiel amikeca ligilo de la diversnaciaj popoloj de Ĉinio.

Descendinte la monteton, ni daŭre iris kontraŭflue de Kari. Survoje ĉie vidiĝis herbaroj. Riveretoj torentas, malrapidaj kaj ĉesas flui. Ni trovis tie la ĝustan fonton de la Flava Rivero. Ni vidis buntajn floretojn en rokfendoj. Kelkloke eliris gutoj unu post alia. Jen la unuaj gutoj de la Flava Rivero. La fonto de la Flava Rivero estas diferenca de tiu de Yangzi-rivero.

La antaŭa elsprucas el la eterne frosta stratumo. Ni ĉerpis per ambaŭ manoj akvon kaj eltrinkis per unu spiro. Mi sentis, ke mi kvazaŭ denove revenis al mia longe nevidita patrino, kaj mi ekploris. La vojqvidanto demandis: "Pri kio vi pensas?" Mi respondis senhezite: "Mi pensas pri la princinoj Wencheng kaj Jincheng, pri antikvuloj kaj ankaŭ pri mi mem." La vojo al la fonto de la Flava Rivero estas peniga. Tamen kiuj venis al ĝi, estas senkompare feliĉaj.

Ho, Flava Rivero, kie montriĝas via grandiozece? Kial vi silentas sen muĝado? Mi komprenas la veron: La granda venas el la ordinara. Ĉu tio ne estas animo de nia nacio?!



Marcelo de la fuente de la
Flava Rivero



La lamaisma templo Yuanshui ĉe la fonto

Sovaĝaj azenoj



ĈU VI HELPUS STARIGI ESPERANTO-DOMON?



F-ino Angéline Taremi prezentas T-ĉemizon, kiun ŝi desegnis por geesperantistoj. La profito de la vendado uziĝos por starigo de Esperanto-domo. Estu la unua en via urbo, kiu havas ĉi tiun belan T-ĉemizon! Bonvolu transdoni vian monon de via konto al ŝia UEA-konto kun jena kodo: feta-r. La prezo estas 30 guldenoj inkluzive ĉion. Bonvolu sendi vian mendilon kune kun via dezirata mezuro (M-L-XL) al Angéline.

P.O. Box 9342
Scottsdale, AZ 85252-9342
USA

